

Esperantisto Slovaka

Gazeto de la Slovacia Esperanta Federacio. Fondita en 1946 de Ernesto Váňa.
Eksterordinara numero 2021

ISSN 1335 5031



Ján Vajs

* 21.06.1953

† 15.09.2021

Enhavo

Redakta noto	3
Kelkaj rimarkigoj pri la slovakia Esperanto- movado dum la korona-tempo	4
Funebra alparolo ĉe la entombigo	4
Konciza biografio de Johano Vajs	6
Pri Liptova E-klubo kvazaŭmozaïke	9
El rememoroj de slovakaj esperantistoj	12
El rememoroj de eksterlandaj esperantistoj	26
Entuziasma vojaĝanto	31
Grava figuro en la slovakia speleologio	31
(Anstataŭ) JARLIBRO 2021	34
El la planoj de SKEF por 2022	43

Membriĝu al SKEF, donacu por Esperanto

Se vi ankoraŭ ne estas membro de SKEF, pripensu aliĝi (aŭ realiĝi) al nia rondo – ja daŭre validas “en unueco estas potenco” – ju pli multaj ni estos, des pli da aktivaj ni povas organizi kaj des pli ni povas informi ankaŭ eksteran publikon pri Esperanto. Pluraj el vi – legantoj de ĉi-numero rekte subtenis ankaŭ eldonon de ĉi-eksterordinara numero de ES. Koran dankon por tio! Jes ja, eĉ danke al tiaj etaj sumoj ni povas plu funkcii. Pripensu, ĉu vi persone povus donacadi ekzemple regule, ĉiumonate certan etan sumon – kiu samtempe ne mankos tro al vi, aliflanke ĝi povas signife helpi al ni. Eĉ nur 5 EUR monate helpas! La kosto de daŭre kreskas, kaj ni tamen volas proponi kvaliton – reklama kaj informa agado, presado de informiloj, kreo kaj prizorgo de la retejo, prizorgo de nova arkivo – ĉiuj tiuj agadoj bezonas elspezojn. Se do Esperanto por vi estas inda je subteno, decidu donaci regule al SKEF-konto! Ni aperigados subtenantojn regule en nia retejo kaj en la jarlibro. Por nun jam 2 membroj decidis pri tiaspeca subteno. Nuntempe nia plej granda (kaj malavara) subtenanto estas Peter Petrovič – kiu regule plurajn jarojn jam donacas po 10 EUR ĉiumonate. Elkoran dankon al li pro tio! La dua estas SKEF-prezidanto Peter Baláž, kiu donacas po 5 EUR. Tio ja helpas nin plani nian agadon pli longtempe kaj konkrete. Aliĝu al la rondo de regulaj subtenantoj – subtenu Esperanton!

Esperantisto Slovaka

N-ro eksterordinara 2021

Gazeto de la Slovakia Esperanta Federacio.
Fondita en 1946 de Ernest Váňa.
Ĉasopis Slovenskej esperantskej federácie.
Založený v roku 1946 Ernestom Váňom.

Respondeca redaktoro

zodpovedný redaktor:
D-ro Stanislav Košecký, esprima1@gmail.com

Provlegado kaj tradukado

korektúry a preklady:
Pavol Petrik, pavol907@gmail.com

Teknika prilaborado

technické spracovanie:
Daria Slonova (E@I)

Membrokotizo por SKEF:

libervola, sed minimume 10 EUR.
Validas kaj por eksterlandanoj, kaj por slovakoj.
Por pagi la kotizon uzu

la **kontonumeron de SKEF** en FIO-Banko:

IBAN: SK72 8330 0000 0026 0082 0124,
SWIFT/BIC: FIOZSKBAXXX.

Krom tio eblas pagi al nia UEA-konto: skef-i.

Atentigo: nepre sciigu vian retadreson kaj
vian pagon anoncu al nia kasisto (vidu sube).

Adreso de la Slovakia Esperanta Federacio

Adresa Slovenskej esperantskej federácie:
L. Štúra 633/37a, SK-018 51 Nová Dubnica, Slovakio

Prezidanto / predseda:

Peter Baláž, peter.balaz@ikso.net

Kasisto / pokladník:

Mária Pilková, maria.pilkova@seznam.cz



Frontpaĝe / Na titulk:

Portreto de Ján Vajs.

Dorspaĝe / Na zadnej strane:

Glubildo de J. Vajs prilaborita de Eva Brezániová + poŝtmarko kun Poludnica Koláž J. Vajsa od Evy Brezániovej + poŝtová známka s Poludnicou

Redakta noto

Ĉi-numere ni komencas nian redaktan noton iom netradicie: per citaĵo el la letero de Július Hauser, kiun nia redakcio ricevis la 15-an de novembro: “La ĉi-jaran aŭtunon mi certe memoros pro la aĉaj novaĵoj, kiuj senkompatate atingis mian poŝtelefonon. La kruela novaĵo pri la subita forpaso de mia amiko Ján Vajs: mallonga, malambigua kaj tute klara mesaĝo, kiu estigis vere grandan suferon en mia kapo. Neeviteble min ŝokis la deprimiga informo pri lia multe tro frua morto. Mi amare konstatas, ke ĉiam pli ofte familianoj kaj amikoj miaj estas tiuj, kiuj adiaŭas la surteran vivon. Simple dirite, personoj, kiuj siamaniere ludis – dumfoje mallongan, dumfoje longan kaj konkretan rolon en mia persona vivo. Estas vere malfacila tasko trovi konvenajn vortojn por komplete prezenti la aktivan kaj kreeman bildon de Ján Vajs. Jano apartenis al la plej influaj personoj de la slovakia E-movado. Li estis longjara esperantisto, fervora organizanto, funkciulo, sukcesa verkisto, pasia kaj nelacigebla monda vojaĝanto, eminenta speleologo, montogrimpanto, biciklanto...” (La aŭtoro de la citaĵo estas memlernanto de Esperanto kaj same la aŭtoro de S-E vortaro 1996 p., 2019 j. ĉe Fork Martin - vidu sur p.15)”. Simple, estas vero: akurate en la mezo de septembro forpasis nia amata membro, inĝeniero pri agrikulturo, Jano Vajs. Elirante el tiu ĉi trista realo decidis kaj SKEF kaj E@I, havantaj sian novan sidejon en Nová Dubnica (legu ĉi-sube), aperigi omaĝe al li eksterordinaran numeron de Esperantisto Slovaka, kiun vi nun tenas en viaj manoj (ĉu legas ĝin en elektronika formo). La numero estas krom 2 paĝoj (komence) kaj 10 paĝoj (fine) komplete dediĉita al la forpasinto. Ni esperas, ke ĝi fariĝos serioza ago al la honorigo de lia oferema, tutviva laboro por Esperanto kaj al lia memoro.

Stanislav Košecký

Grava anonco pri adreso-ŝanĝo

La jaro 2021 signifis plurajn ŝanĝojn - unu el ili temas ankaŭ pri la ŝanĝo de la adreso de organizoj SKEF kaj E@I.

Ambaŭ sidejoj translokiĝis de Partizánske al Nová Dubnica.

Bv. do noti novajn adresojn:

SKEF: L. Štúra 633/37a, 018 51 Nová Dubnica

E@I: Trenčianska 764, 018 51 Nová Dubnica

Rim.: En la unua adreso funkcios ekde printempo ankaŭ la SKEF-arkivo, en la E@I-adreso funkcias la oficejo kaj jam nun laboras tie la E@I-teamo - vi estas bonvenaj viziti nin.

Kelkaj rimarkigoj pri la slovakia Esperanto-movado dum la korona-tempo

Ekde marto 2020 ni vivas “zombie”. La KOVIM-19 (aŭ origine COVID-19) aŭ simpligite “korono” ŝanĝis nian socion, niajn reciprokajn rilatojn, privatajn vivojn kaj laboron. La tutmonda situacio plene ŝanĝiĝis komence de 2020 – kaj ĝi jes ja forte influis ankaŭ Slovakion. Logike, trafita estis forte ankaŭ nia Esperanto-movado. Ne nur sur loka aŭ tutlanda nivelo, sed eĉ en la tutmonda, internacia. Tiu fakte estis trafita eĉ pli forte – ĉar ĝi tuŝis la kernon de la EO-movado: internaciajn eventojn, renkontiĝojn, kongresojn. Sen reciprokaj translimaj kontaktoj restas niaj streboj pri tutmonda paco kaj interkompreniĝo forte limigitaj. Jes ja, ni havas teknologiojn, ni havas interreton (bonŝance!) – kun nuntempaj multaj ebloj kiel efike utiligi ĝin kaj resti en kontakto unu kun la alia – eĉ tutmonde. (Diversaj komputilaj programoj kaj apoj helpis kaj helpas solvi la problemojn, ebligis pli facilan komunikadon, resti en kontakto kun niaj familianoj, amikoj, samideanoj en diversaj mondopartoj.) Malgraŭ la fakto, ke tiuj tekonologioj ja

eĉ mirinde bone plenumas sian funkcion (imagu kiom pli malfacila estus simila situacio, se ĝi okazus antaŭ eble 20 jaroj...), la limigo de reciprokaj homaj kontaktoj forte influis kaj influas nian socion. Kaj same ĝi ja influis nian, jam antaŭ la pandemio malgrandan movadon. Bedaŭrinde, eĉ nun, pli ol 20 monatojn post la eko de la tutmonda vastigo de la viruso, neniuj vidas ian klaran “finon”: finon de la obstrukcioj, liberigon de la translimaj kontaktoj, eblon “reveni” al la antaŭaj tempoj. Jes ja, ofte la ordonoj kaj devigoj fare de la registaroj ŝajnas absurdaj, stultaj kaj/aŭ nelogikaj. Tamen ni esperu, ke la situacio pliboniĝos, ĉar mi certas, ke tiel ĉi, kiel ni vivas kaj funkcias nuntempe, oni jam longe ne eltenos. Ni prepariĝu do por la “postkovida” tempo, kiam eblos denove ĉeesti Esperanto-eventojn vive, brakumi samideanojn, diskuti kun ili la plej diversajn temojn kaj tagfine danci la bambon en amikeca rondo! Ĉar mi persone jam vere antaŭĝojas tiun momenton – ĉu ankaŭ vi?

Peter Baláž – SKEF-prezidanto

Funebra alparolo ĉe la entombigo

Estimata tristanta familio, estimataj gesinjoroj! Permesu al mi adiaŭi nome de slovakaj esperan-

tistoj kun nia kara amiko Johano Vajs. Neatendite nin antaŭ 3 tagoj forlasis vera viro plena de viv-elano – esperan-



tisto, speleologo kaj vojaĝanto Johano Vajs. Profunde afliktitaj ni alvenis hodiaŭ fari omaĝon kaj adiaŭi kun ĉi tiu elstara homo. Lia vivovojo tuŝproksime trakplektadis sin kun la evoluo de slovakia Esperanto-movado. Permesu al mi diri adiaŭ al Johano en la nomo de slovakaj esperantistoj, en la nomo de la movado, al kiu li entuziasme dediĉis sin dum sia preskaŭ tuta vivo.

Esperanta movado strebas helpadi al interkompreno inter homoj kaj nacioj per uzado de ununura, al ĉiu proksima kaj bone komprenebla lingvo. Kaj por tiu ĉi belega ideo Johano engaĝiĝis dum 40 jaroj de sia aktiva vivo.

Verŝajne ne estas en Slovakio homo interesiĝanta pri Esperanto, kiu ne konus lian nomon. Li laboris dum multaj jaroj

en la estraro de la movado kaj ankaŭ kiel prezidanto de Slovaka Esperanta Federacio, Mezslovaka Esperanta Ligo, sed precipe li gvidis Esperantan vivon en liptova regiono. Li organizis renkontiĝojn, prelegis pri la uzado de Esperanto hejme kaj ankaŭ dum internaciaj forumoj, reprezentis Slovakion dum Konsultiĝoj de mezeŭropaj landaj E-asocioj. Multajn jarojn li estis membro de redakcia konsilantaro kaj ankaŭ respondeca redaktoro de la revuo Esperantisto Slovaka. Li ne pendis je siaj funkcioj, male, li puŝis aliajn laborojn kiel funkciuloj por tiamaniere kreski.

Li vere dominante influis E-movadon en Liptovský Mikuláš kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Li estis ĉi tie iniciatinto kaj moviganto de preskaŭ ĉiuj aranĝoj. Li agadis kiel kluba prezidanto, redaktoro de la gazeto Subtrano, organizis fakajn seminariojn, kreivajn metiejojn, Esperantajn vesperojn en la biblioteko de G. F. Belopotocký, sed precipe tre popularajn turismajn aranĝojn. En Liptovský Ján li kreis tradicion de la plej longdaŭra Esperanta aktiveco – vintraj supreniroj al la montopinto Poludnica, kiu januare ĝisvivos 40 jarojn.

Johano dediĉis grandajn fortojn al literaturaj aktivadoj. Li eldonis multajn librojn – tradukojn, proprajn verkojn kaj kronikis, preskaŭ kartografiis la Esperantan vivon en Slovakio – “100 gravaj personoj”, “Kiu estas kiu”, “Slovakaj plejoj” kaj multaj aliaj. Lia lasta verko estis la libreto “Bona homo Vladko Surovček”

pri lia multjara Esperanta amiko. Danke al Esperanto li dum Universallaj Kongresoj vizitis multajn landojn de la tuta mondo de grandaj eŭropaj urboj ĝis Jokohamo aŭ Hanojo. Entute li partoprenis 12 UK-ojn. Li estis unu el la plej gravaj organizantoj de konsiderindaj internaciaj aranĝoj en nia lando, precipe de la Universala Esperanto-Kongreso 2016 en Nitro. Kun esperantistoj li dediĉis sin al turismo ne nur en Slovakio, sed ankaŭ en tutmonda amplekso. Pri siaj ekspedicioj li prezentis kvanton da prelegoj. Li organizis aŭ almenaŭ ĉeestis vojaĝojn al ekzotikaj landoj – de Madagaskaro ĝis Antarkto, Mongolio, Barato, Maroko kaj multaj aliaj. Entute li vizitis 73 landojn el 6 kontinentoj. Danke al li flirtis verda Esperanta flago sur famaj mondaj montopintoj, kiel Fuji, Ararat, Mont Blanc, Gerlach kaj pluraj aliaj. Li scipovis starigi allogajn celojn: 12 monatoj – 12 montopintoj,

27 montopintoj de la Eŭropa Unio ktp. Li tre volonte organizis ankaŭ biciklajn ekspediciojn – “Sukcena vojo”, “Laŭlonge de Danubo de la fonto ĝis ĝia delto”, “Tra sudorienta Slovakio” kaj aliajn. Paradoxse biciklo fariĝis lia destino...

Johano estis ververe nekredeble aktiva homo. Mi nur nekuraĝe esperas, ke en ni restos almenaŭ parto de lia persistemo kaj forto, kiujn li dediĉis al la evoluo de Esperanto.

Kara Johano, ni dankas al vi por ĉio, kion vi al ni dum via vivo ofertis. Viaj spuroj restos en ni, malgraŭ tio, ke vi ĉi tie malĝoje ne plu estas.

Estimata funebranta familio, mi scias, ke neniam vortoj povas redoni amatan homon.

Ni savu en niaj memoroj, ke vivis kun ni kaj inter ni bona homo - Ján Vajs.

Honoron al lia memoro!

La alparolon prezentis ĝia aŭtoro:
Juraj Gondžúr

Konciza biografio de Johano Vajs



En kooperativo dum studado en 1977

Familia medio, karakterizita per laborego, intereso pri pasinteco kaj nuntempo, ankaŭ kolektivismo formas infanojn. En ĉi tiu medio Johano absorbis ĉiujn pozitivajn kvalitojn kaj aplikis ilin en sia vivo.

Profesia kariero: Li studis en Slovaka agrikultura universitato en Nitro, fako zooteknikisto. Eĉ tiam, li estis rekonita de studentoj kaj instruistoj kiel prin-

cipa, respondeca kaj laborema studento. Li funkciis kiel prezidanto de la junulara organizo. Sukcese li aplikis siajn organizajn kapablojn en la junulara movado, organizante sportajn, kulturajn kaj aliajn eventojn ĉe 3 fakultatoj de la universitato.

Poste li laboris kiel ĝenerala direktoro de Slovaka agrikultura kaj nutraĵa ĉambro. Lia profesia kariero finiĝis kiel alta ŝtata oficisto en Ministerio de termastrumado kaj evoluo de regionoj de Slovakio en Bratislavo. Dufoje li ricevis medalon de ministro por termastrumado (2003, 2015) kaj memorplakedon de SANP (2012). En 2016 li ricevis mongolan honorigon de ministrino de nutraĵo kaj agrikulturo. Johano estas viro, kiu dediĉis ĉiujn potencojn kaj eblojn al la solvo de problemoj en la slovaka agrikulturo.

Fervora batalanto por Esperanto: Li esperantistiĝis en 1980. Liaj instruistoj estis M. Zvara, A. Zachariáš, D. Dimitrov, M. Rybín kaj E. V. Tvarožek. Laŭ instrusistemo de SEA li atingis nivelon C. En 1983 li partoprenis internacian lernejon por funkciuloj de Esperantaj organizaĵoj en Varna. Li postenis kiel vicprezidanto de LEK en Lipovský Mikuláš kaj estis funkciulosekretario de CEK SEA kaj prezidanto de ĝia regiona komitato. Johano estis kunfondinto de LEK, MEL kaj SKEF. Kiel prezidanto de SKEF li funkciis en la jaroj 1998-2001. Dufoje li redaktis revuon Esperantisto Slovaka (1999-2001, 2008-2010), estis membro de

redaktaj konsilantaroj de Kooperativa Stelo kaj Vesperto. Li kontribudis per artikoloj al diversaj Esperantaj kaj neesperantaj periodaĵoj. Li partoprenis 12 UK-ojn, multajn tutslovakajn kaj regionajn renkontiĝojn, internaciajn turismajn okazaĵojn kaj diversajn konferencojn. Kelkfoje li partoprenis kaj prelegis dum KAEST (2010, 2012, 2014, 2018). De SEA li ricevis bronzan insignon en la jaro 1987 kaj insignon de UEA en la jaro 2016 por longtempa agado en la movado.



Universala Kongreso Nitro 2016 - manifestacio de esperantistoj tra la urbo. Johano fronte de la marŝantoj.

Ekscitita vojaĝanto: Kiel vojaĝanto li vizitis pli ol 80 landojn en ĉiuj kontinentoj. Li estis iniciatinto, organizanto kaj partoprenanto de longtempaj turismaj kaj vojaĝaj projektoj de esperantistoj: Danuba vojo (1998-2003), Sukcena vojo (2004-2007), Dek du monatoj - dek du montopintoj (2004), Surspure de Habanoj (2008-2012), Mediteraneo (ekde 2008), La plej altaj montoj de la EU (ekde 2008). Ekde 1983 li kunorganizis ĉiujarajn renkontiĝojn de Eo-vojaĝantoj kaj turistoj sub la nomo Poludnica. Li iniciatis kaj kunorganizis



La ĉeestintoj de la vojaĝo al Madagaskaro 2016. Johano supre dekstre.

kreon de ZEO-j en Slovakio: tombon de geedzoj Tvarožek en Nacia tombejo en Martin, memortabulojn al A. Škarvan (Hybe), M. Rybín (Partizánska Ľupča) kaj E-arbaron en Pribylina.

Pasia speleologo: Ekde sia infanaĝo li estis aktiva speleologo. En speleologia fako li organizis kaj partoprenis Speleotendarojn dum la unua periodo (1986-1989) kaj li organizis ekspediciojn, kie estis ligitaj Esperanto kaj speleologio: Rodopy 89 (Bulgario), Kontakt 90 (Aŭstrio kaj Italio). Mont Blanc 91, Ĝibraltaro 92 (Hispanio kaj Ĝibraltaro), Aguj 94 (Mongolio). Estas nekredeble, kiom da tempo li sukcesis rezervi por grotoj. Li ne perceptis subterajn spacojn kiel fermitan tuton, sed li rigardis ilin ne nur kiel malkovrinto, sed ankaŭ kiel protektanto, dokumentfilmisto, historiisto, zoologo, sed ankaŭ kiel fotisto aŭ eseisto. Kun amikoj li malkovris, purigis kaj mezuris plurajn grotojn en liptova regiono. (Pri liaj pliaj speleologiaj aktivecoj legu pli de la paĝo 31).
Verkisto, tradukisto kaj historiisto:

La verkaron de J. Vajs en Esperanto aŭ pri Esperanto oni povas dividi jene: Esperanto en Liptovo 1980- 1985 (1990), Gvidlibro 1991-1993 (1991), Memolibro (1992), La dua decenio (2002), 12 monatoj - 12 montopintoj (2006), Subtatrano, historio kaj bibliografio (2006), Esperantisto Slovaka - bibliografio kaj historio kune kun L. Fajth (2012), Slovakaj plejoj (2016). Biografiaj verkoj: E. V. Tvarožek (1998), Enkorpigita toleremo, Miloslav Rybín (2006), 100 gravaj personoj de slovaka Esperanto-movado (2007), Kiu estas kiu (2016). Bibliofilioj: Ŝafaĵoj (2002), Plena industriita ĉevalo (2006). Vojaĝpriskriboj: Kongresa taglibro 97- Universala Kongreso de Esperanto en Vietnamo (2012), Ultima Thule, kongresumi kaj vojaĝi en Islando (2013). Tradukoj: T. Sekelj: Temudžin, traduko el Esperanto al la slovaka (1995), M. Dobrovičová: La knabino kun vizaĝo de la luno, traduko el la slovaka al Esperanto (2002).

La vivo de samideano Johano Vajs estis multflanka, interesa kaj inspira por aliaj. Danke al personoj kiel li Esperanto vivas jam pli ol cent jarojn. Johano naskiĝis sur la stelo de amikeco, altruismo kaj socia justeco. Tiujn kvalitojn li heredis de siaj Habanaj prapatroj. Li klopodis disvastigi ĉi tiujn valorojn en la socio. Ni konservos lian karan memoron kaj ni daŭrigos laboron, en kiu li ne plu povas partopreni.

Laŭ lia broŝuro **Kiu estas kiu en la Slovaka E-movado (2016) kompilis:**
Mária Pilková

Pri Liptova E-klubo kvazaŭmozaïke

Liptova Esperanto-klubo estas unusola E-klubo en Liptov-regiono, (Slovakio). Ĝi estis fondita post malapero de Esperanto-kluboj en Liptovský Hrádok, Liptovský Mikuláš kaj Ružomberok en la jaro 1993 (21.11.). Ĝin kunfondis Darina Hofereková, Marta Kepeňová, Dušan Kostolný, Miloslav Rybín, Vladimír Surovček, Ján Vajs. Agadkampoj de la klubo estas turismo, literatura verkado (originala kaj traduka), ekspozicioj, diversaj naciaj kaj internaciaj renkontiĝoj kaj propagado de Esperanto. Sidejo de la klubo estis Domo de Matica slovenská en Liptovský Mikuláš. Nuntempa prezidanto de la klubo estas Vladimír Škuta.

(la teksto transprenita de https://eo.wikipedia.org/wiki/Liptova_Esperanto-klubo)

Ĉiujara renkontiĝo de klubanoj en la urba biblioteko

Unu el la aktivecoj de Liptova Esperanto-Klubo / LEK / estis la jarkunveno de membroj en la Biblioteko GFB en Liptovský Mikuláš kun la titolo - Tago de Esperanto-Libro aŭ Zamenhof-Tago, kiu okazas la 15-an de decembro.

Bonaj rilatoj kun la biblioteka direktorino (s-ino Marcela Feriančeková) ebligis niajn renkontiĝojn en iliaj reprezentaj ejoj.

Janko Vajs ĉiam estis la ĉefa iniciatinto de la renkontiĝo.

Dum la jaro ni determinis librotitolon, kiu estis aŭ verkita aŭ tradukita de esperantisto aŭ foje interesa vojaĝraporto. En la aranĝoj ĉiam partoprenadas geamikoj de Esperanto kaj familianoj...

Ĉar la Esperanto-Librotago jam estas en la kristnaska sezono, la renkontiĝoj estis ankaŭ ligitaj kun resumo de niaj agadoj kaj ni ĉiam konsentis fine

pri la dato de la jarkunveno de LEK. Perfekte organizita...

Ĉiuj tiaj ĉi renkontiĝoj okazadis en bona etoso (vidu sur la bildo), ĉar Jano Vajs kapablis ĉiam la partoprenintojn venigi al bona humoro.

Teksto kaj foto:
Vladimír Škuta



Jano Vajs prezentas la novan slovakon tradukon de la libro "La vivo de Zamenhof" faritan de Pavol Petrík (sidanta en la mezo de la foto).

Precizeco en la dokumentado de la projektoj

Tute perfekte faris Janko la dokumentadon kaj statistikon de ĉiuj projektoj, krom aliaj memkompreneble ankaŭ de la projektoj **Poludnica, Ĉe-Danuba bicikla vojaĝo el Donaueschingen ĝis Tulcei** (tuta longeco 2840 kilometroj), **12 slovakaj montopintoj dum 12 monatoj** ktp. Kun la celo detale priskribi la vojaĝojn, li faris por si vojaĝajn taglibrojn. Dum la veturadoj li klarigis al ni, ke tiu ĉi metodo estas bonega kaj ke ni, ceteraj partoprenantoj, povas fari la samon. Ni tion konsideris ĝusta kaj same ni komencis skribi proprajn vojaĝajn taglibrojn.

Vladimír Škuta

Iomete pri la historio de Poludnica

La unua jaro en la historio de tiu ĉi vere bone konata aranĝo estas 1983. En la jaro 1992 estis akceptita por la aranĝo la nomo “Vintra supreniro al Poludnica kaj renkontiĝo de esperantistoj”. De tiu ĉi jaro seninterrompe organizas la liptovaj esperantistoj (ili estis ĝis la jaro 1993 kunigitaj en kvin kluboj kaj rondetoj) kaj ekde la jaro 1994 estas la ĉefa organizanto de la aranĝo la Liptova Esperanto-klubo, mallongigite LEK. La supreniroj en la unua dekjaro havis karakteron de unutaga aranĝo destinita por malgranda cirklo de esperantistoj kaj simpatizantoj de tiu ĉi lingvo, en la dua kaj plua jardeko

Sed ni ne eltenis daŭrigi en tiu ĉi laboro. Konkrete tio aspektis jene: unua tago - ĉiuj dokumentis ĉion travivitan perfekte, dua tago - preskaŭ ĉiuj enskribis la okazintaĵojn de la tago, tria tago - nur ne tuta duono faris priskribojn, kvara tago - eĉ nur du el ni, kvina tago - vespere oni aŭdis pe-tojn: “Pruntu al mi vian enskribaĵojn!” Mi atentigas, ke ne temis pri la mal laboremo, sed pri la lacigo! La ununura, kiu eltenis perfekte prezenti siajn travivaĵojn en propra vojaĝa taglibro, estis Janko... kaj pro tio estas liaj statistikoj tiel utiligaj!

partoprenadis en la supreniroj ankaŭ esperantistoj el la tuta Slovakio. Tiel la unutagaj aranĝoj ŝanĝiĝis al tut-semajfnaj kaj la novan amplekson ili ricevis per plivastigo de origine turismo - sporta al socie-instrua dank' al renkontiĝoj de vojaĝantoj. Poludnica akiris sian lokon kiel diskut forumo kaj krome ĝi estas ege grava ankaŭ el vidpunkto de propagado de Esperanto. Nia strebo estas - en la jaro 2022 organizi la 40-an datrevenon de la supreniro al Poludnica kaj tiel honorigi la memoron de ĝia fondinto kaj propagisto de Esperanto Ján Vajs.

Vladimír Škuta

Ridinda okazaĵo el la vojaĝo al la plej alta monto de Hispanio

La preparo de tiu ĉi evento marŝis tre rapide. Janko Vajs eksciis, ke vojaĝagentejo Adren Tour ofertas la supreniron sur la plej altan monton de Hispanio (en novembro 2011). Li tuj telefonis tien por ekscii, kiom da liberaj lokoj estas dispone. Kaj la aranĝo startis. Potencialaj interesuloj devis mem decidi en la tempolimo de 48 horoj.



Sur la plej alta monto de Hispanio Pico de Teide
Sen longa pripensado mi tuj reagis kaj petis lin, ke li pri mi kalkulu. Janko mesaĝis al mi, ke mi povus trastudi ion pri la plej alta pinto de Hispanio. Iel mi forgesis pri tio. Post unu semajno li vokis min kaj en kelkaj demandoj li volis ekscii mian opinion pri la maniero de la trafiko tien. Mi respondis: “Mi uzus aŭton.” “Aŭton?” li denove demandis. Mi argumentis: “Tio estus pli komforta kaj ĉefe senproblema kun vojaĝpakaĵo ktp.” “Kaj kia estas via opinio?” mi demandis. “Mi uzus aviadilon...!”, li respondis. “Ĉu aviadilon?” - mi respondis surprizite.

“Nu, elektu propran grupon kaj vojaĝu per aŭto kaj mia grupo kaj mi flugos per aviadilo” - diris Ján.
“Sed ne estos bone dividi nian grupon...” - mi respondis.
“Do vi pravas, ne estos bone dividi la grupon”, - diris Johano kaj daŭrigis: “En unu semajno, vi konfesas, vi devus trastudi ion pri la plej alta pinto en Hispanio. Kaj kiel vi rezultis? Ĉu vi eĉ scias, kie ĝi estas?”
“Mi pensas, ke ie en Pireneoj”, mi konjektis, “aŭ en Sierra Nevada, kaj ĝi nomiĝas Mulhacén...”
Kaj subite mi eksciis, ke io estas malĝusta; li ekzamenis min strangmaniere, kion li kutime ne faradis. Kiam mi nur poste esploris la lokon de la plej alta pinto en la Hispania Regno, ankaŭ min ridigis iom mia propono vojaĝi per aŭtomobilo, ĉar la plej alta pinto situas sur la insulo Tenerifo. Ĝi nomiĝas Pico de Teide kaj ĝia alteco atingas 3715 metrojn super la marnivelo.

Teksto kaj fotoj: Vladimír Škuta



En lafa groto Cueva del Viento (insulo Tenerife)

El rememoroj de slovakaj esperantistoj

Ĉiuflanke aktiva, kun vastegaj horizontoj – tiel verŝajne konis Johanon ĉiuj.

Mi persone ĝisfunde admiris lian perfektemon kaj ordon – aferoj, kiujn mi daŭre sensukcese provas lerni de li. Samtempe imponis al mi lia vasta kampo de intereso kaj scioj – ĉu pri profesia laboro, pri arto, literaturo, vojaĝado ktp. Kio estis tamen por mi persone la plej granda admiro kaj estimo, estis lia kapablo solvi problemojn kaj diplomateco, danke al kiu li sukcesis multegon atingi.

Tiun lertecon en diplomataj diskutoj li pruvis multfoje, oftege eĉ sen tio, ke ni ceteraj eĉ scius pri tiaĵo. La plej grava tia ĉi diskuto – de kiu li “eliris kiel venkinto” okazis lige kun nia UK 2016 en Nitro. Ege malmultaj konscias, ke ĝuste Johano laŭvorte savis nian kongreson, eĉ nur kelkajn tagojn antaŭ ties komenco! Kio okazis: nur ĉirkaŭ du semajnojn antaŭ la komenco de la UK mi iris trakti lastajn solvendaĵojn al la urbo Nitra – por ke la kongreso povu glate eki. Unu el traktindaĵoj estis finaj diskutoj kun la direktorino de la studenthejmoj de la universitato, en kiuj ja devis loĝi centoj da kongresanoj (inkluzive ni, la LKK kaj helpantoj). Evidentiĝis, ke la direktorino subite ŝanĝis sian opinion kaj ekpostulis signife pli altan sumon por la tranoktoj, ol ni havis en la antaŭa interkonsento. La

sumo signifus, ke ni devus aŭ postuli de homoj alpagon (kio apenaŭ eblis, ĉar ja plej multaj homoj jam delonge pagis por la kongreso), aŭ ke SKEF devus kovri kelkmileŭran ŝuldon (Kio ankaŭ ne penseblis, ĉar ni havis preskaŭ neniun monon tiutempe). Mi estis tiam ŝokita, konsternita, kolera kaj senespera samtempe. Ne helpis klarigoj, petoj, kverelado nek minacoj. Nia diskuto finiĝis per pato – nek unu flanko volis cedi de sia pozicio. Kun larmoj en okuloj mi foriris, pripensante ĉiujn eblajn solvojn – sed estis jam tro mallonga tempo por trovi alternativajn tranoktojn (des pli kontraŭ tia malalta prezo). Fine mi vokis al Johano, klarigis al li tutan situacion kaj petis helpon. Li senprokraste promesis, ke li faros ĉion eblan por enordigi la situacion. Kaj la promeson li 100% plenumis! Tiutage li faris kelkajn telefonvokojn. Sekvan tagon li persone vizitis la direktorinon, kaj la afero estis savita! La prezo restis kiel antaŭe interkonsentite, la UK povis okazi, kaj ni povis plu okupiĝi pri la kongreso. Kion ĉion kaj kiamaniere li diskutis, ni jam ne ekscios. Sed pere de ĉi-specaj “solvoj de seriozaj problemoj” mi ĉiam tenos Johanon en miaj rememoroj. Efektive, eblas senhezite agnoski, ke la UK 2016 estis grandparte merito de Johano Vajs. Estis multaj elementoj de la kongreso, tre variaj flankoj

kaj kampoj de la tuto, kie li: helpis, influis, konsilis, ekagis kaj ofte solvis. Sen lia 100% engaĝiĝo la kongreso aŭ ne okazus, aŭ ĝi certe ne estus tiom neforgesebla travivaĵo.

Dankon Johano, por ĉiuj tiuj jaroj de kunlaboro kaj amikeco! Vi estis por mi iasenca “Esperanto-patro”, kiu ege mankos dum sekvaj jaroj.

Petro (Peter Baláž)



Nia Janĉjo estis vere eksterordinara homo. Mi vizitadis lin ofte en lia oficejo, kie li laboris en grava funkcio - kiel sekretario de la Slovaka Agrikultura Ĉambro. Li tre volonte dediĉis sian tempon al diversaj esperantistoj por pridiskuti la problemojn de ĉefe estontaj aranĝoj. Malgraŭ tio, ke li estis en E-kampo precipe aktiva kiel longjara prezidanto de la Liptova E-klubo, li neniam rifuzis sian helpon ĉe organizado de unuopaj entreprenoj ĉu kadre de Bratislava E-klubo aŭ de tutslovakaj aranĝoj. Eksterordinara estis lia kontribuo al la organizado de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en Nitro 2016, kie li realigis multon utilan. Ekz. nur surbaze de lia iniciato povis esti plantita memortilio, kiun li mem transportis al la koncerna loko antaŭ la Agrikultura Universitato, kie okazis ĝia solena plantado kun partopreno de la prezidanto de UEA Mark Fettes kaj aliaj gravaj funkciuloj. Ne eblas en malgranda spaco prezenti ĉion. Sed ĉio certe prezentiĝos en aliaj kontribuoj en tiu ĉi numero. Tamen,

ne eblas ne mencii lian koraranĝon Poludnica, per kiu li kreis belegan tradicion de vintra montgrimpado. Mi ankoraŭ ŝatus akcenti liajn bonajn humoron kaj humuron, per kiuj li preskaŭ permanente “ornamis” ĉiun sian agadon kaj kiu vere helpadis supervenki oftajn problemajn situaciojn.



Prezidanto de UEA Mark Fettes plantinte kun Jano Vajs la UK-tilion

Janko Vajs restas en mia memoro kiel modelo de aktiva, oferema esperantisto, tipa movadano, vera “motoro” (malgraŭ liaj iel-tiel aperintaj eraretoj en la uzado de akuzativo).

Honoron al Via memoro kaj farita laboro, Janĉjo!

Stanislav Košecký



Mi rememoras la renkontiĝon kun Jan Vajs en la Urba biblioteko en Liptovský Mikuláš, kie mi prelegis pri la vivo de L. L. Zamenhof. Li prizorgis tranokton por mi en la domo de sia filo en Liptovský Ján kaj tiam li proponis al mi esti redaktoro de Esperantisto Slovaka. Mi malfacile kapablas diri ne, do mi jesis, kvankam mi ne havis sufiĉe da spertoj kun la redaktora laboro, ĉar mi estas tradukisto kaj kontrollegisto.

Pavol Petrík



Kun Johano mi interkonatiĝis en 1982, kiam ni ambaŭ estis elektitaj membroj de Centra Komitato (CK) de Slovaka Esperanto-Asocio (SEA). Post lia reveno de la internacia lernejo por funkciuloj de Esperantaj organizaĵoj en Varno li fariĝis sekretario de la CK. En tiu ĉi posteno li povis plene utiligi siajn talentojn kaj manaĝerajn kapablojn. Mi memoras, ke ni kune partoprenis en 1983 kaj Internacian Junularan Kongreson en Debreceno kaj Universalan Kongreson en Budapeŝto. Por la unua fojo ni spertis tutmondan Esperanto-etoson. La kongresoj donis al ni gravan stimulon por nia Esperanto-agado. Plua neforgesebla memoro por mi estis la internacia Esperanto-konfer-

Sed mi volis helpi al la slovaka Esperanto-movado kaj al la eldonado de la gazeto. Same li instigis min esti provleganto de la kongresa kuriero Pribina dum la UK en Nitra. Do mi havas spertojn kun Ján kiel lerta disdonanto de taskoj kaj malkovranto de kaŝitaj kapabloj aŭ talentoj de aliaj homoj. Li estis vera motoro de la slovaka movado. Li ĉiam estis plena de ideoj, tre bonkora kaj amikema homo.

enco organizita de SEA en Tatranská Lomnica en la hotelo Slovan la 23-an – 25-an de novembro 1984, kiun Johano kaj mi aktive partoprenis. Dum tiu ĉi konferenco mi interkonatiĝis kun mia edzino Marta. Johano ĉiam estis bonega observanto. Li tuj rimarkis kaj ni povis kaŝi antaŭ li nian enamiĝon. Esperanto unuigis nin kaj ekde tiam ĝi fariĝis la lingvo de nia familio. Johano estis kaj ĉe la malfondo de SEA en 1994, ĉe renovigo de nia nacia movado kaj ĉe fondo de nova landa organo - Slovacia Esperanta Federacio en 1997. Mi tre ĝojis, ke Johano venis labori al Bratislavo al Ministerio de Agrikulturo de Slovakio. Tiam ni rekomencis nian kunlaboron. Post la membriĝo de Slo-

vakio en la Eŭropa Unio ni ambaŭ partoprenis en tutsocia diskutplatformo pri problemoj de EU “Nacia Konvencio pri EU”.

Johano dediĉis sian tutan vivon al Esperanto kaj ĝia interna ideo. En sia diversflanka agado li efike utiligis siajn talenton, karismon, komunikajn, manaĝerajn kapablojn kaj spertojn al antaŭenigo de nia movado. Lian gravan kontribuon mi vidas en kolektado de informoj pri historiaj faktoj, dokumentado de nia movado, ilia prezentado en interesaj prelegoj, eldonado de libroj de fakto. Pere de tiu ĉi multfaceta agado li ebligis, ke ili restos konservitaj en la estonteco por multaj esperantistoj kaj neesperantistoj. Samtempe li

grave kontribuis al honorigo de generacioj da eminentaj esperantistoj, kun kiuj ni kunlaboris kaj multe lernis de ili. Ni memoras, ke ili ankaŭ sopiris pri organizado de UK en Slovakio en la ora epoko de nia movado, sed bedaŭrinde cirkonstancoj ne permesis al ili efektiviĝi ĝin.

Post la subita kaj frua forpaso de Johano restis multaj nefinitaj planoj en diversaj kampoj, en kiuj li entuziasme kaj senlace agadis. Estos ege malfacile anstataŭi lin.

Kara Johano, estis mia granda plezuro kunlabori kun vi por nia Esperanto-movado. Ripozu en paco, nobla animo de Johano!

Jozef Reinvar



Jano Vajs klare pruvis sian manaĝeran talenton kaj kapablon. Per aliaj vortoj, li estis viro, kiu amis labori kaj preferis koncentriĝi je la praktika utileco de komuna neŭtrala lingvo. Kompreneble, Jano mem havis siajn ideojn, kiujn li ĝisoste defendis, sed li neniam trudis ilin al la aliuloj. Li havis siajn fortajn konvinkojn, sed samtempe sciis neŭtrale interrilati kun ĉiuj.



Bedaŭrinde ni ne tre ofte renkontiĝis persone, sed mi komunikis kun Jano retmesaĝe, konversacianta pri la diversaj aspektoj de verkado, kiuj rilatis al niaj vivoj. Ne nur en Bratislavo, sed ankaŭ en Martin. En 2018, omaĝe al lia 65-a naskiĝfestoj, mi intervjuis lin pri lia Esperanto-vivo. Li reagis tre rapide, kompreneble kaj kun klara perspektivo de plua kreema laboro en la Esperanto-movado (vidu mallongan artikolon en ES 2/2018).

Mallonge kaj koncize dirite: Jano estis helpema, altruisma kaj respektama homo. Jano estis longvida, sagaca kaj pionira homo. Jano estis sentema kaj

modesta homo. Sendube lia devizo estis “vortojn ŝparu, agojn faru”. Jano estis paculo. Li kredis kaj esperis je la paco, ĉar li estis vera homo de paco. Uzante oksimoron – Jano estis malgranda granda ulo (laŭ la romano de Thomas Berger el 1964). Laŭ mia per-

sona opinio, li fariĝis fama slovakia E-legendo jam dum sia vivo... Mi ĉiam danke konservos lin en mia memoro. Estu al “Liptova Johano” la tero malpeza!

Július Hauser
emerita ambasadoro de Slovakio



Mi ne scias, kiam mi la unuan fojon renkontiĝis kun Jano Vajs, sed mi memoras, ke jam en la komenco de mia esperantistiĝo mi kun mia amikino Hanka partoprenis – tiam ankoraŭ unutan – grimpadon al la montopinto Poludnica, do devis tio okazi jam antaŭ 30 jaroj... La hejmuloj tuj sciigis al ni, ke en la grupo estas unu eksterlandano



Žilinaninoj kun Jano Vajs dum la 90-a UK-o en Vilno 2008. Fejfi la dua de dekstre.

el Anglujo. Poste ili ridetis, kiel ni du, freŝbakitaj esperantistinoj, venadis al tiu angla samideano kaj klopodis kon-

versacii kun li. Nur vespere ili malkaŝis al ni, ke tio estis ne iu anglo, sed unu loka klubano! Kaj Jano poste ofte rememoradis pri Hanka, korpulenta knabino, kiu profunde eniĝadis en la dikan neĝan tavolon, sed tamen brave venkis la montopinton.

Jano estis homo, kiu simile, kiel mia instruisto de Esperanto Vladko Němec, sukcesis konvinki la homojn al agoj, kiujn ili de si mem neniam estus farintaj. Tial dum nia ekspedicio al la fama franca montopinto Mont Blanc li ordonis al ni ĉiuvespere enskribi en la kajeron travivaĵojn de la tago. Poste ankoraŭ ĉiu ricevis la taskon prilabori ĝeneralajn informojn el la destinita temo. Dank’ al tio mi nun posedas bele binditan libron ne nur kun tiuj tekstoj, sed ankaŭ kun la bildkartoj, fotoj kaj aliaj rememoraĵoj pri tiu ĉi vojaĝo.

Al tiu ekspedicio rilatas ankaŭ nia “plej intima” komuna rememoraĵo. Revenante el la aŭstra montopinto Grossglockner, kiun ni trejncele antaŭe suprengrimpis, Jano volis, ke mi iom plirapidigu mian descendadon.

Mi faris laŭ lia peto – sed ho-ve! Subite mi glitis, terenfalas – kaj en mia artefarita vestaĵo jam “sledis” fulmrapiĝe malsupren, kaj survoje super la rando de la profunda glaĉera truego.

Mi ĝis nun memoras ĝian belegan bluecan koloron. Sed la plej interesa estis nia interparolo. Mi vokis: “Jano, kion mi faruuuu?!” Kaj nia Johano revokis: “Bremsuuu!”. Poste li konfesis, ke kelkfoje mi “timigadis” lin en sonĝoj, kaj ĉiam li estis pensanta pri

tio, kiamaniere li estus anoncinta mian forpason al mia panjo.

Do, mi vivas plu, sed nia Johano jam forlasis nin por ĉiam, malgraŭ ke li ankoraŭ tiom multe povis fari por la slovakia E-movado. Espereble ie tie “supre” li nun ankaŭ organizas interesajn turismajn ekspediciojn por la anĝeloj kaj por la aliaj verduloj, kiuj lin tien antaŭeniris...

**Fejfi –
Magdaléna Fejfičová**



Jano estis esperantisto ne nur en sia koro. Li multe laboris kaj volis, ke Esperanto en Slovakio funkciui. Pri tio atestas lia E-laboro. Post la revolucio en la jaro 1989 neniĝis Slovakian Esperanta Asocio kaj Jano aktive laboris por renovigi Esperanto-movadon en Slovakio. Krome li organizis diversajn E-aranĝojn por praktikado de la lingvo, ekz. Poludnica, kreivajn metiejojn, literaturajn renkontiĝojn kaj diversajn turismajn aranĝojn, pri kio verŝajne vi povas legi en alia loko. Mi memoras lin precipe pro lia serioza laboro por E-movado en Slovakio. Post ĉeso de SEA li aktive laboris por novaj slovakiaj organizoj. Lia ideo estis konstrui regionajn E-organizaĵojn, kiuj poste konstruu tutslovakian E-organizon. Do Jano estis unu el pluaj esperantistoj, kiuj fondis mezslovakian E-organizon nomatan Mezslovakia Esperanto-ligo

(MEL) kaj poste Slovakian Esperantan Federacion (SKEF). Pri MEL oni komencis labori en novembro 1994 en Rajec, kie kunsidis la prepar-komitato kaj ĝia prezidanto fariĝis Jano. Poste, la 23-an de aprilo 1995, okazis en Liptovský Ján fonda konferenco de MEL, kies ĉefa organizanto estis Jano. Li estis ankaŭ unu el prepar-komitatanoj de SKEF-fonda kongreso, kiu okazis dum la tagoj 31-an de majo kaj 1-an de junio 1997 en la hotelo Esperanto en la vilaĝo Pribylina.

Dum unu labora renkontiĝo li menciis, ke estas grave skribi pri siaj aktivaĵoj por estonteco. Kaj tiun-ĉi sian ideon li praktikis ĝis la fino de sia vivo. Li kun serioza intereso priskribis ĉiujn aranĝojn, kiujn li organizis kaj li forlasis por interesuloj multe da statistiko, libroj kaj artikoloj.

Lucia Mikulovská - Fedorová



En aŭtuno 1974 mi ekstudis ekonomion kaj Johano Vajs zooteknikon ĉe la Agrikultura Universitato en Nitra. Iun tagon mi trovis anoncon en iu banka fenestro. Ĝi tekstis: Ĉu vi volas koni internacian lingvon - Esperanton? Venu inter nin. Mi ĉeestis sekvan kunvenon. En la klubo estis ĉirkaŭ 20 junuloj. Prezidanto Johano Mužlay entuziasme klarigis la historion de la lingvo. Tagoj pasis, komenciĝis instruado kaj devoj en junulara organizo. Johano okupis plurajn postenojn kaj finis kiel prezidanto de tutlerneja komitato. Li respondecis pri aranĝoj de ĉiuj fakultatoj. La urban klubon mi vizitis nur tri fojojn. Esperanto kaj aliaj interesoj cedis antaŭ devoj.

Pli ol tri jardekoj pasis. Venis jaro 2016. Slovaka Esperanto-Federacio estis komisiita organizi la 101-an Universalan Kongreson de Esperanto en Nitra. En aprilo 2016 okazis en Nitra



Nitra 2016, samklasanoj de la universitato: J. Vajs, V. Rataj, M. Václavjaková, J. Dvonč

kunveno de la loka komitato. Tiam denove eniris en mian vivon E-klubo en Nitra. La ideon verki historion de la klubo kaj organizi ĝian ekspozicion proponis prezidanto de SKEF Petro Baláž. Johano adresis al mi postulon priskribi ĝian historion. Mia unua reago estis, ke li freneziĝis. Sed li sukcesis konvinki ĉiujn. La rondo ekzistis en Nitra jam antaŭ la dua mondmilito. Precizaj informoj pri la klubo ne estis konservitaj. Ni povis rekonstrui nur agadon de la jaroj 1971 ĝis 1989 surbaze de la kroniko kaj revuo Informilo. Komenco estis malfacila. Kiel priskribi eventojn, en kiuj mi ne partoprenis? Kiel trakti multajn informojn, kian formon elekti? Post tri tagoj mi volis rezigni, ĉar mi ne sciis kiel koncepti ĝin. Johano mallonge skribis al mi sian ideon kaj aldonis: "Vi plenumos ĝin." Mi daŭrigis dum du monatoj. Samtempe mi tradukis tekstojn, kvankam kun eraroj. La fina E-versio estis kompletigita sur kvin paneloj helpe de staĝantoj el Partizánske. Johano, mi kaj Petro Holba instalas en sinagogo ekspozicion pri historio de la Eo-rondo kaj pri la vivo de L. L. Zamenhof. La 22-an de julio 2016 la ekspozicion malfermis la urbestro de Nitra Jozefo Dvonč. La preparado de la Universala Kongreso estis ege defia por slovakaj esperantistoj. Tio estis hektika tempo, en kiu

Johano Vajs ludis gravan rolon. La kongreso okazis en areo de nia Alma Mater. Johano organizis, aranĝis kaj kuraĝigis la aliajn. Samtempe li plenumis gravan verkon pri historio de la movado kaj broŝuron pri Slovakio. Li prilaboris ĉion apud sia laboro en

la ministerio. Universala Kongreso de Esperanto en Nitra enskribiĝis por ĉiam en memoron de 1 214 partoprenantoj el 59 landoj. Nitra kaj la Kongreso por ĉiam ligiĝos kun la nomo de Johano Vajs.

Mária Václavjaková



Dum mia vivo mi renkontis multajn homojn. Kelkaj lasis nur malgrandan rememoron, sed iuj restis en mia kapo por ĉiam. Certe tio estas pro tio, ke mi ek troviĝis kun ili en diversaj vivsituaĵoj – ĉu agrablaj aŭ malmolestaj.

Unu el ili estis Janko Vajs. La rememorojn kun li mi havas senmezure multe. Mi elektas la ekspedicion al Mont Blanc okazinta dum la tagoj 31. 8. – 14. 9. 1997. Ĝi estis por li kiel ĉeforganizanto jam la tria post Rodopy 1989 kaj Kontakt 1990.

La veturilo kaj por 14 tagoj ankaŭ hejmo estis por ni ŝrankoaŭtomobilo



Antaŭ la grimpado al la pinto de Mont Blanc

Avia Furgon, kun kiu ni traveturis 3425 km. Ĝi ĉion eltenis kaj en la sano nin alveturigis hejmen. La ekspedicio estis sufiĉe multnombra. Jen estas nomoj de 10 kunvojaĝantoj: Johano Vajs, Búda kaj Hučík, Janka Mitašová, Magda Feifčová, Ivica Benická, Vladko Surovček, Rašto Michalko, Mirko Eliáš, Pavol Pukaj.

La plej pretenda alvoko estis supreniro al Mont Blanc. Nin atendis fizike tre klopoda grimpado. Forgesu nuntempan sportan ekipaĵon kaj vestaĵon. En la jaro 1991 ĝi estis pli simpla kaj ankaŭ pli peza. Forgesu porteblajn telefonojn – ili en Slovakio ankoraŭ ne ekzistis.

El la baza kampadejo en Chamonix - Les Houches (993 m.s.m.) la 6-an de septembro je la 16-a horo komencis la grimpadon 4 ĉeestantoj (Vajs, Eliáš, Michalko, Mitašová). La duan tagon ekkuniĝis la dua grupo en la alteco 2768 m.s.m. (Benická, Feifčová, Hučík, Pukaj), kiuj eluzis telferon kaj dentradan fervojon ĝis la alteco 2372 m.s.m.

Ĉe la kabano Gouter (3836 m.s.m.) ni helpe de pioĉetoj elfosis tiel nomatajn

neĝajn enteriĝojn kaj la nokton ni tradormis en dormosakoj kovritaj de izolaj arĝentaj foliaĵoj. De la jaro 2009 estas tendumado ĉu en neĝaj enteriĝoj aŭ sub tendoj malpermesita.

La 8-an de septembro je la 3-a horo komencis la plej malfacila parto de la supreniro tra glacimonto por 5-membra grupo. Pro tre forta vento ni je la 6:30 ekhaltis en la tendaro Vallot (4362 m.s.m.). Ĝi estis tiel plena, ke ni preskaŭ ne povis trovi lokon por sidiĝi. Pro granda ŝtormo je la 8:00 Mitašová kaj Benická revenis suben. Jam nur Vajs, Eliáš kaj Michalko daŭrigis supreniron. Je la 10:30 ili sur la pinto de Mont Blanc (4810 m.s.m.) ĝuis impresojn, kiujn scipovas priskribi nur ili. Dume ĉiuj ceteraj en baza kampadejo senpacience kaj ankaŭ timete atendis la revenon de amikoj. Estis tio vere longdaŭra atendado. Kiam la venkintoj ekaperis je la 22:45,

★ ★ ★

Mi konis Jan Vajs kiel tre aktivan kaj diverstalentan homon. Li aktivis en diversaj kampoj kaj faris ĉion je la plej alta nivelo. Nur memoru liajn statistikojn pri diversaj aranĝoj. Oni povus paroli kun li pri diversaj temoj, pri lia laboro en la kampo de agrikulturo, sed li ankaŭ dediĉis sin al kulturo. Tion pruvas mia lasta renkontiĝo kun li, kiam li organizis ekspozicion por la liptovaj

ni ĉiuj havis grandegan ĝojon. Ne nur pro tio, ke ili sukcesis stari sur la montopinto, sed precipe ke ili revenis sanaj kaj senlime feliĉaj.

En mia kapo restas rememoroj al:

- interrilata subteno – kiam vi ŝajnas senforta, la rideto de amikoj ektiros vin pluen;

- interrilata helpo – kiam via dorsosako estas ĉiam pli peza kaj tiu, kiu jam estas supre, revenos kaj suprenportos ĝin, kvazaŭ al vi flugiloj ekkreskus;

- beleco, kiu vin impresas sidante kune en la alteco de 3836 m.s.m., apogataj sin je kabano kaj sub vi estas blanka maro, super vi blua firmamento kaj la suno. Vi trinketas teon kun slovakaj lakto “Salko” kaj apud vi estas veraj amikoj...

Do tiaj ĉi estas la homoj, kiuj restas en mia memoro eterne.

Mi dankegas, Janko Vajs.

Janka Mitašová

esperantistoj pri la inkaŭoj en la kastelo de Bratislava. Ili alvenis per trajno kaj renkontiĝis ĉe la kastelo kaj post la trarigardo ni iris kune por biero kaj tagmanĝo. Ankaŭ ĉi tie montriĝis lia eksterordinara organiza kapablo. Mi havis la okazon partopreni en la Poludnica aranĝo, kiun organizis Jano, kaj mi povas diri, ke la multflankaj programeroj en L. Ján kaj ĉirkaŭaĵo estas unu el miaj plej belaj spertoj el la

agado de esperantistoj. Ni ankaŭ ŝatis kunlabori kun li en la organizado de la Universala Kongreso en Nitra, kaj eĉ unu jaron antaŭe ni ĉeestis kun li la kongreson en Lille por konatiĝi kun la tuta kongreso kaj taskoj de ni kiel estontaj volontuloj. Kompreneble, kiel estis karakteriza por li, li aktivigis nin ĉiujn dum la vojaĝo kaj dum la kongreso. Specife, ni devis prepari

mallongan klarigon por la aliaj kunpasaĝeroj pri la urboj kaj vidindaĵoj vizitotaj survoje, kaj vespere en la hotelo ni skribis kaj tradukis informojn pri la aranĝoj en la kongreso en la retejo. Li estis eksterordinara homo, kiu konstante inventis programojn kaj agadojn kaj riĉigis nin per ili. Koran dankon pro tio.

Rozália Molnárová

★ ★ ★

Al kiu mi diru vortojn afliktitajn post akcepti anoncon malĝojan?

- Kamarado, ĉiuflanka ĉiam, forpasis elinter rondoj niaj.

Fundan kondolencon diras mi sincere al familio lia kaj al ĉiu lia konatulo.

Tuj preĝante el anim' diras mi parkere, ke al lia animo ripozon donu Eternulo.

Tibor Kepencay

★ ★ ★

Mia unua renkontiĝo kun Janko Vajs (Johano Blanka) okazis dum Somera Esperanto-Studado en la jaro 2018 en Liptovský Mikuláš. Mi piediris de fervojstacio kaj kontraŭ mi veturis Janko kaj Petro Baláž. Ilia aŭtomobilo haltis kaj Janko komencis paroli rapide en Esperanto,

sed mi ne estis kapabla paroli kun li, ĉar mi lernis sola kaj nur dek monatojn. Mi partoprenis kun li montgrimpon al Poludnica, kie ni povis vidi lin en la tasko de kuraĝa gvidanto. Post la Somera Esperanto-Studado mi aliĝis al membroj de Liptova Esperanto-Klubo.

Miroslava Šavelová

★ ★ ★

Forpasis kelkaj tagoj de neatendita morto de inĝeniero Ján Vajs, kaj homo tamen komencas kredi,

ke li jam ne plu vokos nin. Ŝajne sana kaj forta homo, kiu supervenkadis mondajn montpintojn, peze laboris en

subteraj regionoj serĉante kaj trovante novajn grotojn, ofereme laboranta ne nur por propra familio, sed ofte ankaŭ por konatuloj kaj tiu ĉi homo tiel surprize mortis.

Oni diras, ke ĉiu homo estas anstataŭebla. Sed tio certe ne validas rilate al Ján Vajs. Liaj respondecaj postenoj certe alportis multajn problemojn, ofte mal-facile kaj longtempe solveblajn. Li tamen ĉion sukcesis solvadi, kaj krom tio ankoraŭ havis diversajn interesojn. Kiel vojaĝanto li traveturis multajn landojn kiel agrikultura fakulo. Krom tio li volis ekkonadi novajn kaj novajn landojn, urbojn, regionojn, ktp. Li traveturis ĉiujn kontinentojn, ankaŭ Antarkton.

La vilaĝo Liptovský Ján estis liaj infaneco kaj certeco, kie li havis domon, kie jam lia patro funkciis kiel vilaĝestro, kie vivas liaj filo kaj nepinoj.

Esperanto estis ankaŭ grava intereso de Ján Vajs. En tiu ĉi kampo li estis ankaŭ

signifa fakulo. Li transprenis gvidadon de Liptova E-Klubo, kaj tenis nin, aliajn klubanojn en intereso pri la kluba kaj por-esperantista vivo. Ne ekzistis problemoj, pri kiu li ne estus kapabla racie paroli. Ĉiam li klopodis helpi al la movado ne nur en nia klubo, sed ankaŭ en la kadro de Slovaka respubliko. Similaj saĝaj kaj sukcesaj homoj plej ofte ne kontaktas simplajn homojn, sed Ján Vajs estis bona amiko kun ni, ĉiuj klubanoj. Lia aŭtomobilo servis por ni, se ni ne havis eblon atingi iun E-aranĝon. Ankaŭ en nia persona vivo li ofte helpadis al ni, ne nur rilate al Esperanto.

Mi ekmemoris kelkajn interesarojn pri li, sed tio estas nur malgranda parto de liaj aktivaĵoj. Eble iu pli lerta ol ni kompilos pli detale lian vivon, kaj faros libron atestantan pri eminenteco de tiu ĉi homo, kiu povas esti modelo por ni ĉiuj.

Eva Lepišová kaj Peter Piar



Laŭ interesa projekto de Jano ni efektivigis en aŭgusto 2021 belegan ekskurson. Oni povas nomi ĝin biciklo-pieda turisma ekskurso. La ĉeestantoj: LEK-anoj Jano, Beátka Vajsová kaj Žilinoj Renátka Staňová, Jana Kostolná, Adriana Albertová, geedzoj Ján kaj Anna Urban renkontiĝis en Okcidentaj Tatroj en aŭtorestadejo en la parto de Podbanské (940 m.s.m.).

Tie ĉi ili dividiĝis en du grupojn. La unua grupo biciklis tra Silenta valo (Tichá dolina) kaj la dua tra Aneta valo (Kôprová dolina). Poste ambaŭ grupoj piede supreniris al montopasejo Závory (1876 m.s.m.).

La dua grupo admiris en ĝi ankaŭ montarlagojn kaj akvofalojn. Fine de asfalta vojo (kie ili lasis biciklojn) la valon ornamis Akvofalo de Kmeť. Kaj la fino de nia ekskurso? Ambaŭ gru-



poj denove renkontiĝis en Podbanské. Jes, ankaŭ tiamaniere renkontiĝadas esperantistoj. Danke al Esperanto ni ĉiuj estas veraj multjaraj geamikoj.

La homo persistas sen homoj, tamen ĉiu bezonas geamikojn.

Kiam amikoj renkontiĝos, la koroj refreŝiĝos.

Amikecoj plimultigas ĝojojn kaj etigas suferojn.

Bedaŭrinde unu el nia rondo jam forlasis nin. La inicianto de preskaŭ ĉiuj tiuj piedaj kaj biciklaj ekskursoj, Johano Vajs, jam ne estas inter ni. Janko, ne timu, dum ĉiu venonta turisma ekskurso ni rememoros vin!

Jana Kostolná



Brila persono en la Esperanta mondo. Agema kaj energiplena homo, ĉiam inventema, ĉiam organizanta iun partoprenindan aranĝon. Moviĝema spirito. Tiel mi konis lin, bedaŭrinde, nur ekde januaro 2004, dum renkontiĝo Poludnica, kien venis min mia filo Marteno. Inter la homoj diversaj laŭ profesioj, karakteroj, aĝo, kiujn kunigis ideo de amikeco - Esperanto, fartis mi komforte, hejmece.

La etoson de tiu kvartaga aranĝo influis la personon de la organizanto, gvidinta nin supren, tra krutaj, glitaj padoj, al Obo-piramideto de amikeco, kiu konsistas el ŝtonoj - suveniroj de vojaĝoj de ĉiuj el la partoprenantoj, kvazaŭ

memoroj konservitaj en la ŝtonoj. Pri tiuj, aŭ pri aliaj interesaj aferoj dum vesperoj aŭdiĝis prelegoj en Esperanto. Li instigis homojn aktiviĝi, kune partopreni kulturajn aranĝojn.

Li venigis eksterlandajn gastojn por interesaj renkontiĝoj.

Kaj li aranĝis progresigajn lingvokursojn: en sia laborejo, laŭ Vojaĝo en Esperanto-lando de Boris Kolker. Li gvidis la kurson tiamaniere, ke unu juna kursanino proklamis: "simple, mi amas vin!"

Dum li redaktis Esperantiston Slovakan, li insistis pri kontribuado kaj per sia karismo li sciis homojn laborigi. El partoprenantoj de la

aranĝoj ĉiam iu devis verki artikolon. Tute speciale “pinta” sperto por mi estis grimpado laŭ “Agla pado” en Altaj Tatroj, kiu miakulpe daŭris 15 horojn, elĉerpiĝis miaj fortoj ĝisfunde. Kaj mi eĉ devis raporti pri tio por ES.

Dank' al liaj fantaziaj projektoj: *Suk-*



Lingva kafejo en Bratislavo. Malantaŭe maldekstre M.Minichová, prezidantino de la Klubo

cena vojo, Landoj de Mediteraneo, La plej altaj montopintoj de EU-landoj, Laŭ spuroj de Habanoj... mi ellernis vidi mondon de alia flanko, sperti la diferencon inter simpla turisto, kiu supre observas kaj serĉas amuzon kaj vojaĝanto. Nur oni devis atenti pri lia spica humuro kaj emo tromp-konduki onin je nazo, sed pro tio povus ofendiĝi nur iu memplaĉa aŭ troserioza.

Admirinda kapablo prete kaj sprite vortumi siajn travivaĵojn kaj situaciojn kaŭzas, ke liaj vojaĝ-taglibroj estas senmankaj, eĉ kun specimenoj, humuraj rimarkoj kaj notoj, kaj ili meritis aperigon.

Mária Minichová



Kiam Johano forlasis nin, mi ek-konsciis, ke ni ambaŭ travivis en E-movado multon similan. Mi ofte admiris lin, iam li incitis min kaj okazis ankaŭ, ke li min de tempo al tempo bone elturnis.

Johano kaj mi komencis dediĉi nin al Esperanto en la sama jaro – 1982 kaj nia E-vivo havis pli multe da similecoj, kvankam Johano estis ĉiam pli multe aktiva kaj post la jaro 2007 (centjariĝo de slovaka E-movado) mi jam tute ne sukcesis eĉ kuratingi lin.

Relative rapide ni konatiĝis unu kun la alia kaj ni ambaŭ sinsekve fariĝis dominantaj anoj de niaj kluboj. La situacio ja tiam estis sufiĉe pli bona – pli multe

ol 3 000 membroj de SES en preskaŭ 100 kluboj kaj nur E-klubo Žilina havis proksimume 100 klubanojn. Nin ambaŭ kaptis elstaraj E-personoj – lin Miloš Rybín kaj min Vlado Němec. Johano estis frapanta persono ĉiam plena de ekpensoj kaj provokanto, kiu tiamaniere scipovis atingi siajn celojn. Kaj se tio ne helpis, li puŝis alie por devigi homojn plenumadi siajn planojn. Min, kiel klasikan neperfortan demokraton tio ofte koleris, sed fine mi devis konfesi, ke li havis rezultojn. Post sociaj ŝanĝoj en 1989 kaj disfalo de SES en 1994 ni kunfondis Mezslovakian E-ligon (MEL), sed la iniciatinto estis memkompreneble li kaj ankaŭ

fariĝis ĝia unua prezidanto. Mi fariĝis la prezidanto de MEL post li. Post ekesto de SKEF en 1997 ni interŝanĝis la rolojn – kiel la unua prezidanto estis elektita mi kaj la dua fariĝis Johano, sed ni kune iniciatis la SKEF-ekston jam dum UK-o en Prago 1996.

Ni ambaŭ dum multaj jaroj organizis Esperantan kluban vivon en L. Mikuláš kaj Žilina. Mi pli multe dediĉis al kluba membrobazo.

En la j. 2004 žilinoj ekkreis E-arkivon en la dometo de L. Fajth en Plevník, kiam ili traveturigadis multegajn materialojn el Spišská Sobota kaj Dudince, nu kaj Johano prizorgis tabulojn por librobretoj kaj li volonte tien venadis helpi.

En Liptovský Mikuláš kaj Žilina ni ankaŭ disvolvidis similajn aktivecojn: Poludnica (1983 - 2021) - TUTA (1973 - 1994); bulteno Subtatrano (1984 - 1989) - bulteno Raportanto (1987 - 2007); Regiono Liptov 1994 (Esperanto en Liptov) - Esperanto en Žilina 1983 (Němec); Kreiva metiejo 1998, 2000, 2003 - SAEST Žilina 1985, 1988. Ĉi tie ja nia simileco finiĝas. Lia eldonanta, tradukanta kaj verkanta laboro, lia vojaĝado tra la tuta mondo, biciklaj kaj turismaj ekspedicioj kaj multe da aliaj aktivecoj – tio jam ne estis por mi kaptebla kaj mi nur admirante rigardis.

Juraj Gondžúr



Kun Janko Vajs ni komune studadis en la Agrikultura altlernejo en Nitro. Ni studentoj estis multnombraj - 3 mil. Sed tiuj, kiuj faris pli ol estis necese, ne estis multaj. Al tiuj ĉi malmultaj apartenis ankaŭ Janko. Eĉ ni apartenis al diversaj fakultatoj, ĝuste nia “eksterlerneja agado” estis tio, kio nin unuigis. Li estis vere senlaca kaj respondeca organizinto. Kiel engaĝitaj interesuloj ni el la 70-aj jaroj fondis en la universitato E-rondeton, kiu dense kunlaboris kun la E-klubo en la urbo Nitra.

Post fino de la studado niaj vojoj disiĝis. Janko komencis aplikadi siajn fakajn, sed precipe organizajn sciojn

en la praktiko kaj mi restis labori en la universitato. De tempo al tempo ni renkontiĝadis, precipe ĉe realigado de studentaj praktikumoj kaj brigadoj. Ni daŭrigis en la kontakto, ankaŭ ĉe lia funkciado sur la plej altaj postenoj en la agrikultura fako. Estis vere simbole, ke la 101-a UK efektiviĝis en la areo de Slovaka Agrikultura universitato en Nitro. Mi sciis de li, ke li havis komplikajn kaj malfacilajn vivon. Malgraŭ tio li ĉiam kapablis trovi tempon por vojaĝado, speleologio kaj aliaj multspektraj intereso. Kun belegaj rememoraĵoj al li, li restas en mia penso por ĉiam.

Vladimír Rataj (profesoro de Agrikultura universitato Nitra)

El rememoroj de eksterlandaj esperantistoj

Mi ne plu rememoras mian unuan renkontiĝon kun Johano Vajs, sed mi bone rememoras niajn multajn renkontiĝojn jam ekde antaŭ 1989 kaj dum diversaj Esperanto-aranĝoj, kaj kiel funkciuloj, membroj de Ĉeĥoslovaka komitato (tiam kunordiganto de la agadoj de ĈEA kaj SEA), kaj dum turismado. De tiuj lastaj mi menci almenaŭ, kiel mi iam ŝerce demandis lin ene de la turismado en la montaro Velebit dum la MKR (Montkabana Renkontiĝo), ĉu li estas tiel manĝema, ke li devas porti pro lunĉo tiel grandan dorsosakon. Kaj Johano malfermis ĝin kaj montris al mi la enhavon. Do mi vidis, ke li kunportas montgrimpan ŝnuregon kaj pliajn praktikajn ilojn bezonatajn, kaze ke iu ektraviĝus dum la montara turismado en malfacilaĵo. Mi ĉiam admiris lin, sed tiam mi eĉ pli ekkonis lian respondecon, modeste kaŝitan. Kaj li kiel montara spertulo sentis moralan devon esti ĉiam sufiĉe ekipita por povi efike helpi, se bezonate. Kaj nepre mi devas mencii nian plej lastan renkontiĝon, unu semajnon

antaŭ la bedaŭrinda forpaso de li. Ni ambaŭ aktive partoprenis per prelegoj la inaŭguron de la nova ekspozicio en Esperanto-muzeo en Svitavy. Tie ni ankaŭ havis nian lastan interparolon, dum kiu ni inter aliaj temoj prezentis al ni reciproke niajn plej proksimajn Esperanto-agadojn kaj planojn. Kaj li informis min, ke li komencis kolekti vojaĝpriskribojn aperigitajn en Esperanto kaj ke lia celo estas kolekti ĉiujn, kiuj iam aperis, ĉar tio ja estas malofta temo de Esperanto-libroj, do la plenumo estas, kvankam ne simpla, tamen reala. Tial li tre ĝoje bonvenigis la novaĵon, kiun mi tie prezentis, nome Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado de Ludwig Boltzmann. Kvankam mi ne scias, kiom da libroformaj vojaĝpriskriboj li jam kolektis, mi tre ŝatus, se iu transprenus tiun lian torĉon kaj la kolekto vere estu kompletigita, rememore kaj honore al ĝia iniciatinto Johano Vajs kaj ke ĝi laŭeble portu lian nomon. Kiel certe ĉe multaj, ankaŭ ĉe mi daŭre restos belaj rememoroj pri la amikeco kun Johano Vajs.

Petr Chrdle (Ĉeĥio)



Kun Ján Vajs mi interkonatiĝis en la jaro 2012 dum KAEST en Modra. Tiutempe li prelegis

pri diversaj specoj de nodoj. Fakte tiu ĉi prelego ne tro interesis min. Tamen pli poste dum diskutado li invitis min

al januara ascendo al la monto Poludnica. Ĉi tiu okazaĵo ege plaĉis al mi, tial mi poste partoprenis ĝin eĉ sepfoje. Ján ĉiam zorgis pri komforto de ĉiuj ascendantoj. Mi konsideris lin bona amiko. Dum alia KAEST ni foje eluzis sunan veteron kaj iris promeni en la ĉirkaŭaĵon de la urbo Modra. Interalie ni komparis 2 preĝejojn en la urbo, kiel ili malsamas laŭ ornamaĵoj. Li eĉ trovis ĝardenon de sia parencino, kiun li longtempe ne vidis. Promenante en iu sakstrato ni hazarde ekvidis multekostan aŭton, kiu rapide preterveturis nin kaj same rapide bremsis antaŭ unu ĝardeno. Du viroj elaŭtiĝis kaj eksonoris. El la domo

eliris plua viro kaj alproksimiĝadis al la ĝardeno pordo. Ĝis nun nenio eksterordinara. Tamen vidinte nin la viro tuj malrapidis, eĉ haltis. La viro antaŭ la pordo rigardis al ni kaj silentis. Mi tute ne sciis, kion mi opiniu pri tiu stranga konduto. La unua rekonsciigis Ján.

“Karlo, ni prefere revenu!” kaj ni turniĝis kaj iris la alian direkton.

“Kial?” demandis mi.

“Verŝajne temas pri iuj krimuloj, kiuj ne ŝatas havi atestantojn de sia agado.”

Tiamaniere ni eble savis niajn vivojn, ĉar la suspektindaj homoj vere ne plaĉis al mi.

Karel Votoček (Ĉeĥio)



Mi opinias, ke mi kaj Jano ekkonis unu la alian dum renkontiĝoj de mezeŭropaj Esperanto-organizoj. Eble mi lin vidis pli frue, sed kiam estis la unua fojo, mi jam ne memoras. Dum tiuj renkontiĝoj li ekestis vidata de mi kiel bona E-aganto. En la jaro 2000 kiam la renkontiĝo estis organizita en Zagrebo - Kroatio, de slovaka flanko venis al poloj propono, ke ni poloj vojaĝu nur al slovaka Žilina kaj de tiu urbo ni vojaĝu kune kun slovakoj per ilia aŭtomobilo. Tiamaniere ni ŝparos monon. Tiel okazis kaj dum komuna vojaĝo ni multe babilis. De tiu momento slovakaj esperantistoj estis por ni, por poloj tre simpatiaj.

La simpatio havis sian daŭrigon. Dum diversaj E-aranĝoj ni estis bonaj konatuloj. Mi povas aldoni, ke dum la Universala Kongreso en Jokohamo (Japanio - 2007) ni poloj kaj slovakoj hazarde loĝis en la sama loko. Pro tempoŝanĝo ni ne povis dormi laŭ japana ritmo. Do, ni babilis iom drinkante ĝis malfrua nokto.

Poste estis vizitoj al slovaka E-aranĝo al Poludnica ĉiam komence de jaro. Ĉio estis perfekte organizita per Jano kun lia teamo. Se mi bezonis bastonojn aŭ ion alian, okazis, ke slovakoj havis ĉion. Neforgeseblaj aranĝoj. Ĉu estos aliaj slovakoj pretaj anstataŭi Janon kaj plu organizi la aranĝon? Tio estas tasko

por slovakoj. Mi ĝojus, se verko de Jan plu ekzistus. Organizu la aranĝon memore al Jan Vajs!

Al la unuaj aranĝoj mi venis kun mia amiko Staszek Mandrak per lia aŭtomobilo, sed kiam mi decidis mem vojaĝi per trajne, Jano Vajs ĉiam estis preta transporti min de Liptovský Mikuláš al Liptovský Ján. Dankon al li!

La aranĝoj en Liptovský Ján havis por mi kaj por Jan grandan influon. Ekscitante, ke mi partoprenas en aranĝo Esperanto-Sumoo, li petis min prelegi. Post mia prelego Jano iĝis la unua slovak partoprenanto en tiu aranĝo. Mi povas aldoni, ke ankaŭ post mia prelego pri Nepalo Jano Vajs kun sia teamo vizitis la landon. Dum la aranĝo Poludnica en Liptovský Ján mi rigardis prelegon de Jan pri vojaĝo al Madagaskaro. Tiam mi petis Janon, se li organizus iun vojaĝon ien, mi tre volonte estos partoprenanto.

Ne pasis multe da tempo kaj Jan kontaktis min kun propono, ĉu mi ne volus partopreni ekskurson tra la mondo.



Antaŭ kelkaj jaroj mi partoprenis kune kun aliaj geesperantistoj el Slovakio, Ĉeĥio, Aŭstrio, kaj Bulgario nian komunan ekskurson al la bulgara Rila montaro kaj poste al la greka montaro Olimpo (kiun mi ĵus re-vizitis vagante tra Balkanaj montoj antaŭ kelkaj tagoj). Rev-

Mi pritaksis miajn financajn eblojn kaj respondis pozitive al propono de Jan. Tiamaniere mi travivis mian plej grandan vojaĝon en mia vivo, kompreneble kune kun slovakoj kaj Jano Vajs. Tio estis neforgeseblaj momentoj. Prelego de Jano pri la ekskurso estis la plej kvalita, kiun mi vidis. Nur li scipovis rakonti pri la ekskurso tiel altnivele kaj sufiĉe nelonge.

Kompreneble poste estis aliaj renkontiĝoj. Jan kun teamo vizitis mian urbon Zabrze kaj vizitis turisman karbominejon Guido. Tuj poste ni komune venis al pinto Ĉantorio, kiu situas sur ĉeĥa-pola landlimo. Tie tradicie okazas E-renkontiĝoj.

Ĉi-jare ĝuste sur la pinto Ĉantorio ni vidis unu la alian lastan fojon. Poste venis al mi nur informo, ke mia amiko Jan Vajs ne vivas. Bedaŭrinde, sed kion fari? Eble nur memori lin. Jano estis neforgesebla homo. Dormu trankvile, mia amiko!

Aleksander Zdechlik
(Pollando)

enante tiam al Slovakio Jano gastigis nin en Bratislava, kie ni tranoktis. Mi petis pri ebleco printi bileton por mia buso al Krakovo. Li diris al mi, ke ni povos fari tion venontan tagon matene en la laborejo. Mi dubis, ĉu oni permesos al mi eniri sidejon de iu firmao, kiu dungis Janon. Li tamen diris, ke neniu

problemo, ke ĉiuj pordoj malfermiĝas. Matene ni veturis tien duope je kelkaj



Bonetose, kiel kutime, grimpante al Poludnica



Jam komence de la jaro mi preparas ekspozicion por la Esperanto-Muzeo. Al tio ankaŭ apartenas preparo de tritaga programo. Jano Vajs estis ĉiam por mi granda helpanto. Ĉiujn librojn, kiujn li verkis, li donacis al nia muzeo.

Ĉi-jare, en la jaro 2021, tio estis same. Jam de printempaj monatoj ni interkomunikis. Ni interkonsentis, ke la programon por kunveno ni precizigos dum supreniro sur Grandan Ĉantorion. Jam matene antaŭ supreniro mi ricevis sms-on de Jano: “Ni ekveturis el Liptovský Mikuláš”. Nia svitava grupo ekiris el vilaĝo Nýdek jam je la sepa kaj duono, ĉar veterprognozo promesis 34 C. Tiel okazis. Por mi estas tia temperaturo senpere mortiga. En unu momento mi estis preskaŭ sen fortoj. Sed mi jam scias, ke la slovak grupo de

tramhaltejoj. Mia surpizo estis granda, kiam ni venis al la sidejo de slovak ministerio, kie Jano laboris kiel ĝenerala direktoro. Kvankam mi ne sukcesis printi bileton tie pro tujaj devoj de Jano, tio turniĝis esti senproblema poste. Li estis tre aktiva kaj eksterordinara persono, kiu inspiris aliajn al agado. Plej ofte ni samopiniis. Plaĉis al mi saĝaj vortoj de Jano pri homoj kaj ilia sinteno surbaze de edukado ricevita de siaj familioj.

Adamo Wilkus (Pollando)

nelaciĝantaj esperantistoj atingos nin en ĉiu momento. Post kunveno ni faris kelkajn fotojn kaj intertraktis, ke ni kunvenos denove supre. Ĉi-tie mi kun Jano kompilis programon de la Kunveno en la E-Muzeo. Ĉar la temo de la ekspozicio estis UK-oj, mi petis Janon konatigi nin pri malantaŭ-kulisa laboro antaŭ la 101-a UK en Nitro en la jaro 2016. Li volonte promesis kaj proponis al mi ankaŭ unu prelegon pri sia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo. Mi estus malsaĝa, se mi ne prenis tion! Ja Jano estas bonega rakontisto kaj siajn rakontadojn li ĉiam plibuntigis per sia persona humoro.

Vendrede la 3-an de septembro li alvenis el Slovakio sola. La posttagmezan sabatan programon malfermis Jano per prelego “Malantaŭ-kulisa laboro pri La Universala Kongreso en Nitro”. Ni scias, ke la kunlaboro

kun UEA ne estis simpla. Malgraŭ tio la loka organiza komitato ĉiujn



J. Vajs kun L. Dvořáková ĉe debato pri ekspozicio
obstaklojn venkis kaj la 101-a UK en Nitro apartenis al la plej sukcesaj. Ankaŭ neesperantistoj el Svitavy venis aŭdi la prelegon “Vojaĝo ĉirkaŭ

la mondo”. Ĝi estis tre interesa. Jano plenumis al si per tiu vojaĝo sian revon. Por la vojaĝo li precize pretiĝis. Ĉar li ŝatas sian landon, ankaŭ eksterlande li serĉis ĉeĥoslovakajn postsignojn. Ekzemple dum la vizito de Tahitio sur la insulo Vavau li ne rezignis, ĝis li trovis memoraĵon de Rastislav Štefánik, kvankam ĝi estis en militista spaco. Sian prelegon pri la vojaĝo ĉirkaŭ la mondo Jano fermis: “Tuj donadas medalojn, sed mi donas el la koro al Blanka Ĉuhelová – emerita direktorino de la Urba muzeo, praktikan donaceton – pece-ton da liptova parenico.”

Libuše Dvořáková (Ĉeĥio)



Mi konsideras Janon modesta, klera, laborema homo kun alta organiza talento, bona scio de Esperanto, kun amuza kaj amika aliro al ĉiu homo. Estis plezuro kunlabori kun li dum la UK-o en Nitra. Mi partoprenis kunvenon en Svitavy nun en septembro, kie ankaŭ Jano interese parolis pri la malantaŭkulisaj preparoj por la UK-o. Adiaŭante lin, mi dankis al li pro la kuraĝo, kiun vi, niaj fratoj, disvolvis, por ke la UK-o entute povu okazi. Laŭ mia vidpunkto, mi taksas la UK-on en Nitra kiel tre sukcesan kaj interesan. Precipe la marŝo fine de la UK estas neforgesebla kaj certe ne malaperos el la memoro

de ĉiuj partoprenintoj... Same kiel iliaj personaj spertoj. Mi diris al li, ke la UK-o en Nitra estis mia 19-a kaj ankaŭ la plej bela.



Li respondis: sed estos pliaj kongresoj, mi revidos vin poste... kaj li ĉirkaŭbrakis min por adiaŭi...

Jana Křížková (Ĉeĥio)

Entuziasma vojaĝanto

Janko Vajs estis ekflamita vojaĝanto. De lia “metiejo” eliris eĉ projekto - Supreniro de esperantistoj al la plej altaj montoj de Eŭropa Unio. Kiam Kroatio membriĝis en EU (1.7.2013), tio fariĝis por Jano tuj alvoko kaj post 10 tagoj ni ekveturis. La plej alta monto de Kroatio nomiĝas Sinjal (1831 m.s.m.) kaj troviĝas ĉe la urbo Knin,



kiu estas konata per grandaj bataloj dum la civitana milito, kiam la kroatoj akiris la regionon super la urbo nur en la jaro 1995.

Ni loĝis en privata domo kaj dum debatoj kun ĝiaj havantoj Janko demandis, ĉu la supreniro al Sinjal estas sekura (li pensis pri minoj). “Memkompreneble”, respondis la domhavanto, “se nia lando ne estus senminigita, oni ne akceptus nin al EU”. Sed la sento pri la “mina” danĝero akompanis nin konstante dum nia supreniro al la plej alta monto de Kroatio. En ĝia ĉirkaŭaĵo troviĝas multaj karstoj kaj grotoj kaj tie ĉi eĉ fontas la rivero Krka. Kiam ni estis sur la pinto, dum rigardado al ĉirkaŭaj montaroj de la norda Dalmacio Janko konstatis, ke ene de la montaro Dinara devas troviĝi multaj grandegaj grotoj. Eblas, ke iam ni ĝisvivos la veron de la prognozo de Janko.

Rim.: Ni krome vizitis eĉ indianan vilaĝon (ĉe la rivero Krka oni nome produktis “indianajn” filmojn). Ni tie prunteprenis kelkajn indianajn scenejbezonaĵojn. Janko tiam elektis tiun ĉi “ĉapelon” - vidu la foton.

Teksto kaj foto: **Vladimír Škuta**

Grava figuro en la slovaka speleologio

Oni povas diri, ke estis feliĉo por la speleologia komunumo, ke Janko Vajs pasigis sian infanaĝon kaj junecon en la valoj Demänovská kaj Jánorská, kiuj per siaj grotoj influis lian percepton de

la mondo. Post restarigo de Slovaka Speleologia Societo en 1970 li fariĝis membro de Regiona Grupo Liptovský Mikuláš, kie li kunlaboris kun gravaj speleologoj. Tamen lia speleologa koro apartenis al Jánorská dolina, kie li kaj liaj

amikoj malkovris en la jaro 1989 grandan daŭrigon en Ursa groto, li ĉeestis grandajn malkovrojn en Pustá groto en Demänovská valo. Estas nekredeble, kiom da tempo li sukcesis dediĉi al la grotoj dum sia laborŝarĝo. Li ne perceptis la subterajn spacojn kiel fermitan tuton, sed li rigardis ilin ne nur kiel malkovrinto, sed ankaŭ kiel protektanto, dokumentisto, arkeologo, zoologo, klimatologo, sed ankaŭ kiel artisto, fotisto aŭ eseisto. Li publikigis



En la Nova Stanišov-groto (Malaltaj Tatroj)

dekojn da sciencaj, dokumentaj, historiaj, popularigaj kaj artaj artikoloj pri grotoj. Li esploris grotojn tra la mondo kaj eĉ pripensis trovi grotojn en Antarkto. Neforgeseblaj estis la vojaĝoj al Mongolio aŭ niaj komunaj bivakumoj en la plej longa rusa groto ĉe la rivero Lena en Siberio. Jano havis ankaŭ la donacon fari eventon el vojaĝo al konataj turismaj lokoj, kiu havis pli profundan signifon kaj alportis novajn sciojn por la slovaka speleologio. Liaj vojaĝoj al Madagaskaro kaj Meksikio havis eĉon en multaj inspiraj konversa-

cioj. La planoj, kiujn ni havis kune, estis ankoraŭ por multaj jaroj. Nun ni restas solaj kaj estos malfacile por ni. Sen Jan, lia persisto, superrigardo kaj sindediĉo, la Nicolaus Speleoklubo, kiun li en la jaro 1991 helpis starigi, ne estos la sama. Mankos al ni lia vizio, liaj laboremaj manoj kaj spertoj, kiujn li akiris laborante en altrangaj administradpostenoj kaj, kompreneble, lia humuro. La trajtoj de lia karaktero ne povas esti priskribitaj en kelkaj linioj, sed por ilustru lian profilon, mi priskribas kelkajn el la rakontoj, kiujn mi spertis kun li.

Sala karsto en Ukrainio: En la jaro 1993 ni organizis biciklovojaĝon ĉirkaŭ Subkarpata Rusio. Ni ne havis klaran celon, preskaŭ mankis informoj pri Ukrainio, kaj survoje ni sekvis la Gvidilon al Slovakio kaj Subkarpata Rusio el la antaŭmilita periodo, kiun pruntedonis al ni Alois Lutonský. Dum ni promenis ĉirkaŭ la barita areo de la minejoj, policisto, maljunulo kun fusilo kaj oreklaptiloj, alkuris al ni el la kaduka kabano. Li demandis per akra tono pri nia celo en la proksimo de la sala firmao. Jano tuj respondis, ke ni estas slovakaĵoj, ĵurnalistoj kaj nur rigardas la firmaon kaj poste ni planis viziti la direktoron de la firmao. El lia reago evidentiĝis, ke post ĉi tiuj vortoj lia memfido malpliigis, li maltrankviliĝis kaj telefonis al la sekretario de la direktoro. Post kelka tempo da komunikado li enlasis Jan-on. Li revenis post kelkaj horoj kun necerta paŝado kaj memorinda frazo: "La direktoro estas denaskulo el Kremnica, mi

havas kelkajn gutojn da alkoholo en mi kaj la ekskurso estas prizorgita..."

Esploro de mongolaj grotoj: La ekspedicio al Mongolio estis markita per speciala ĉarmo. Ĝi estis markita per absoluta manko de informoj pri tio, kio atendas nin ĉi tie. Ĝis la lasta momento ni tute ne sciis, ĉu nia ĉefa celo, la kalkŝtona groto, eĉ ekzistas. Famaj geologoj malinstigis nin kaj diris, ke ne ekzistas karsto en Mongolio kaj ke estas do senutile iri tien por speleologia celo. La klara formuliĝo de geologoj de Jano plenigis lin per iom da interna forto por pruvi la malon. Kiam ni estis rekompencitaj pro niaj persistaj klopodoj kaj staris dum kelkaj tagoj piede en la valo sub la Ŝamana groto, en la mongol-rusaj landlimaj montoj, subite aperis sur siaj ĉevaloj mongolaj limgardistoj kun malagrabla frazo: "Vi estas en la landlimo kaj laŭ la leĝoj de la Respubliko de Mongolio vi bezonas permeson moviĝi en ĉi tiu areo. Ni petas prezenti ĝin." Ĉiuj membroj de la ekspedicio eksilentis, neniu atendis tian renverson de la situacio, ĝuste kiam ni havis la celon atingeblan. Kompreneble, ni ne havis permesojn. En tiu ĉi situacio povus helpi la mongola amiko Enĉ, kiu atendis nin ĉe la vadejo ĉe la rivero Balz, kiun ne povis transiri nia ŝoforo, ĉirkaŭ 40 kilometrojn de la groto. La malvarma sango de Jan tiam savis la situacion. Li respondis ankaŭ en la bona rusa kun tono, kiu ne dubis pri niaj agoj: Kompreneble ni konas la leĝojn kaj ni

havas permeson, ĉar alie ni ne irus ĉi tien. Tamen, la limgardistoj volis vidi la permeson. Jano tiam respondis kun malvarma sango: Ni estas en la tajgo, ni havas la paperon en la aŭto kaj ni ne kunportis ĝin, por ke ĝi ne estu detruita. La memfido de Jan kaj lia korpa lingvo diserigis policianojn. Post kelkaj trankviligaj frazoj de ambaŭ flankoj, mi estis ordonita eltiri la botelon. Post kelkaj glasoj malaperis la oficiala parolado kaj post kelkaj horoj niaj militistoj pafis en la aeron per ardaĵoj el kalaŝnikov por plifortigi la amikecon inter la slovaka kaj mongola popoloj.

Esperanto: En la jaro 2002 ni revenis al Mongolio por descendi en la profundan abismon de Galtai aguj, denove situanta ĉe la mongola-rusa limo. Kiam ni alproksimiĝis al la loko en nordorienta Mongolio, ni akiris novajn informojn pri la loko kaj historio de la loko. Dum la vojaĝo ni preparolis ion ajn kaj Sveto Krno mokis Jan, kie li povas paroli sian Esperanton. Ne longe daŭris kaj ni haltis por informi kaj refreŝiĝi en jurto staranta en la stepo. Krom la dommas-trino estis hejme ankaŭ knabino en siaj mezlernejaj jaroj, kaj demandite, kian lingvon ŝi lernas, ŝi rapide respondis: la rusan, la anglan kaj Esperanton. Post tiu ĉi okazaĵo Jano havis bonan argumenton en siaj manoj pri la lernado de Esperanto, kaj dum longa tempo li memorigis al Sveto ĉi tiun okazaĵon el la mongola kamparo, kompreneble, kun dozo de ironio, kiu estis kutima por li...

Teksto kaj foto: **Peter Holúbek**

(Anstataŭ) JARLIBRO 2021

Malgraŭ diversaj problemoj, kaŭzitaj ĉefe pere de kaj pro la pandemio de koro-
no-viruso, ankaŭ en 2021 okazis ĉe ni
diversa agado, pri kiu indas raporti.

Ekpretigo de la Esperanto-arkivo kaj biblioteko en Nová Dubnica

En aŭtuno 2020 ekposedis E@I en
la urbeto Nová Dubnica spacon
(de 200m²) por planita oficejo –
temas pri eksa nutraĵvendejo, dekstre
de la funkcia trinkejo “U supa” (Ĉe
vulturo). Origina plano estis rekon-
strui la spacon por krei de ĝi oficejon.
Kun tiu plano ekis printempe 2021 re-
konstruaj laboroj.

Intertempe komenciĝis interparo-
loj kun UEA, ke E@I helpu pri kelkaj
konkretaj taskoj: nome organizado de
UK-oj kaj la libroservo. Tiuj laboroj
do transiros en 2022 plene al Nová
Dubnica, kie nun E@I jam havas sian
novan situon. La rekonstruata loko do
iĝos la nova arkivo kaj sidejo de SKEF,
aldone enhavos ankaŭ la libroservon



La ejo de ekstere kaj ene en la nuna stato

Efektive ja okazis multo pli, sed ne
ĉio eniras al ĉi-gazeto kaj ne pri ĉio ni
estis informitaj.

Jen do almenaŭ la plej gravaj kaj sci-
indaj okazintaĵoj:

kaj arkivaĵojn de UEA. Eblos uzi ĝin
ankaŭ por diversaj eventoj laŭbezone
(kunsidoj, diskutoj, brigadoj).

Multega laboro jam estis farita – mal-
graŭ ke por “eksterulo” eble ne as-
pektas tiel. La rekonstruaj laboroj de
ene, ordigado, portado de mebloj, pu-
rigado... - ĉio tio daŭris dum dekoj da
horoj dum la tuta 2021. (Kaj prefere ni
ne parolu pri la diversaj burokrataĵoj,
kiujn ni daŭre ĉiujn ne venkis, por
ekzemple ekhavi propran elektron,
gason kaj akvon.)

La deziro kaj plano estas povi jam
printempe 2022 plene uzi la spacon.
Via helpo (ĉu fizika, ĉu financa) estas
pli ol bonvena. Ni ekhavas reprezentan
kaj utiligan spacon por niaj aktivaĵoj!



Virtuala prilingva ludo-konkurso: LingvaKvíz

En 2020 kaj 2021 ne povis sep-
tembre okazi la evento “Lingva-
Fest’”, kiun E@I okazigis ekde
2018 - kiel la unuan kaj solan lingvan
festivalon en Slovakio. (La aranĝo
okazas ĉiam ĉirkaŭ la 26.9., kiu estis
deklamita “Eŭropa tago de lingvoj”).

Jam printempe 2020 venis do ideo krei
iun retan, virtualan alternativon – por
tamen proponi al homoj iun prilingvan
aktivaĵon, kie oni povus ekscii per amuza
maniero iujn interesaĵojn pri diversaj
lingvoj. Tiel naskiĝis nova projekto:
“LingvaKvíz” – <https://kviz.lingvafest.sk>. En ambaŭ jaroj do oni povis ludi
dum unu monato la kvizon kaj en ĝi
gajni diversajn valorajn premiojn.

SKEF estis partnero de la konkurso
dum ambaŭ jaroj – donacis premiojn
por la kvizo. Ene de la kvizo estis ankaŭ

pluraj demandoj pri
Esperanto kaj plan-
lingvoj ĝenerale. An-
kaŭ tiel ĉi eblas iom
“reklami” pri nia lin-
gvo al la ekstera publiko. (La kvizon
ludis ĉefe ĝejnuloj, do estas tre bona
maniero konatigi ilin kun Esperanto
ĉi-stile: neperforte, amuze, eduke.)
Ĉu LingvaKvíz okazos ankaŭ en 2022
daŭre ne estas certa – dependos, ĉu oni
sukcesos trovi sufiĉajn sponsorojn, por
povi kovri la kostojn de la tuto. (Deziro
ankaŭ estas re-okazigi LingvaFest – ĉi-
foje verŝajne en Trenčín.) Se do eble vi
konas firmaon aŭ organizon, kiu ŝatus
kontribui (ĉu per financoj aŭ per pre-
mioj), por ke LingvaKvíz aŭ Lingva-
Fest okazu ankaŭ en 2022, sciigu nin je
info@ikso.net.



Diplomo por elstara agado por E@I-teamo

En la Fermo de la 2-a Virtuala
Kongreso de Esperanto (VK)
estis anoncitaj 14 ricevantoj
de la Diplomoj pri Elstara Agado aŭ
pri Elstara Arta Agado, aljuĝataj de
la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.
Ĉi-foje ĝi ankaŭ venis al Slovakio, ĉar
unu diplomo iris al Petro Baláž, Do-
rota Rodzianko kaj la teamo de E@I.
La teksto de la diplomo:

Petro Baláž, Dorota Rodzianko kaj la
teamo de E@I (Slovakio) pro la elstara
agado en organizado de aranĝoj kaj

projektoj, inter ili KAEST (ekde 2010),
SES, SEP, Poliglota Kunveno (ekde
2017), *mallonge.net*, kaj pro la teknika
realigo de diversaj Esperanto-eventoj
dum la pandemio, inter ili la Monda
Festivalo de Esperanto, VK de UEA,
IJK (2020) de TEJO kaj VEKI de ILEI.

DIPLOMO PRI ELSTARA AGADO

PER TIU ĈI DIPLOMO UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
PREMIAS



**Petro Baláž, Dorota Rodzianko
kaj la teamo de E@I**

PRO ELSTARA AGADO POR LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO.

Esperanto - kultura nemateria heredaĵo de Slovakio?

En la jaro 2020 (sed ankaŭ en 2019) ni nome de SKEF kaj SKEJ sendis kandidatiĝon al Ministerio de kulturo de Slovaka respubliko por enskribi Esperanton en la liston de slovaka nemateria kultura heredaĵo. Denove venis negativa respondo – kaj denove la oficiala respondo – tutsame kiel la jaron antaŭe – estis tro supraĵa kaj eĉ neĝusta. Oni do malakceptis nian proponon. Bedaŭrinde, pere de ĉi-respondoj pruviĝas, ke ĉi-nivelo oni ne interesiĝas pri subteno de Esperanto kaj ne komprenas ties sencon. (Interesa estas la fakto, ke similan enskribon tamen akceptis

jam kaj Pollando kaj Kroatio – do evidente la prioritatoj kaj pritaksoj por enskribi al ĉi-speca listo ege malsamas kaj varias de lando al lando.)

La ideo por enskribi Esperanton en tiu ĉi listo do devos en Slovakio ŝajne atendi – ne (plu) havas sencon reprovadi pri tiu ĉi temo en nia lando. Prefere ni do uzu niajn forton kaj energion por aliaj aktivajoj, kiuj (espereble) alportos pli konkretajn kaj pozitivajn rezultojn. Re-provi ĉi-agadon havos ŝajne sencon nur post ŝanĝo de la politikaj cirkonstancoj, ĉar la nunaj evidente ne favoras Esperanton. Ni do esperu!

Slovakion vizitis la prezidanto de UEA Duncan Charters

En septembro (9.-11.9.) vizitis Slovakion nuntempa prezidanto de UEA: Duncan Charters. Li loĝas en Usono (origine britdevena), sed estis en Eŭropo por viziti plurajn landojn, rilate al siaj Esperanto-aktivecoj por UEA. De Vieno, kie li kunsidis en la Esperanto-muzeo li venis al Bratislavo, de kie jam Peter Baláž lin veturigis aŭte al la nova sidejo de kaj E@I kaj SKEF. La vizito rilatis al la realigataj planoj, por ke E@I transprenu parton de la taskoj de la nuna Centra Oficejo en Roterdamo. S-ro Charters vizitis kaj la novan oficejon de E@I, kaj la arkivon/bibliotekon, kiu estas ankoraŭ rekonstruata. Li konatiĝis kun la E@I-teamanoj, kun la urbeto, sed ankaŭ mallonge vizitis

la regionan urbon Trenčín. Dum lia vizito akceptis lin urbestro de la urbo Nová Dubnica, s-ro Peter Marušinec kaj ankaŭ Richard Hančín, estro de la departemento pri edukado kaj kulturo de Trenčín-memrega regiono. Gravaj taskoj por la tutmonda Esperanto-movado do estos realigataj ekde



D.Charters (tria de maldekstre) kun la E@I-teamo sur la ĉefa placo de N.Dubnica

2022 ĝuste de la urbeto Nová Dubnica, de Slovakio. Kunlaboro kun UEA iĝos do dum la ontaj jaroj multe pli densa kaj

riĉa – espereble tio povos helpi ankaŭ por ekhavi pli da SKEF/SKEJ-membroj kaj ĉefe aktivaj esperantistoj en Slovakio!

Helpu pri rekonstruo de la retejo www.esperanto.sk

Nia ĉefa retejo esperanto.sk bezonas jam urĝe rekonstruon – kaj teknike kaj enhave ĝi iĝis eksmoda, en 2021 venis do decido pri ties kompleta refaro. La paĝaro nun ekhavis bazan aspekton kaj strukturon. La bunta aspekto (vidu la ilustran bildon de la ĉefpaĝo) devas respeguli la frapfrazon, kiun planas SKEF uzi dum ontaj jaroj por varbado pri Esperanto: “Esperanto – bunta lingvo”. (Aldone al plia “Esperanto – pli ol nur lingvo”) Ĝi celas klarigi al eblaj interesatoj variecon de nia movado, prezenti ties buntecon idean, kulturan, socian kaj diversecon, kiu aŭtomate ligiĝas kun la tutmonda lingvo.

En la nuna fazo bezonatas aktualaj kaj taŭgaj enhavoj, por ke la retejo povu ekfunkcii ne nur kun la nova aspekto, sed ankaŭ kun kvalita kaj ĝisdata enhavo. Pri tio estas via helpo pli ol bonvena. Ĉu vi emas helpi por ĝisdatigi nian re-

tejon? Bv. kontakti “peter.balaz@ikso.net” kaj proponi vian helpon. Bezonatos kaj helpo pri ĝeneralaj tekstoj, sed ankaŭ pri unuopaj grupoj, kluboj. Ne hezitu do kaj kontaktu nin – ju pli frue vi helpos, des pli frue ni havos belan, modernan kaj utilan novan retejon!

PS: Post ties pretigo estas planata trejnado, por instrui al pluraj interesitoj redaktan laboron – por ke ni povu pluraj aktualigadi la retejon kaj aldonadi novan enhavon. Danke al tio ni povus havi ĝisdatajn informojn pri nia movado, haveblajn en nia ĉefa paĝaro kaj servi ankaŭ kiel montrofenestro al eblaj novaj esperantistoj.



VK (Virtuala Kongreso) – teknike organizata de Slovakio

Ekde la dua mondmilito okazis la Universalaj Kongresoj ĉiujare – ĝis la Kronviruso aperis fine de 2019 kaj sekve influis tutan mondon – inkluzive nian Esperanto-komunumon. Tial do nun en 2020 kaj ankaŭ en 2021 devis esti la ĉeestaj UK-oj nuligitaj.

Tamen estus ja tre domaĝe ne proponi al la EO-komunumo iun alternativon – la eblon rekontiĝi almenaŭ virtuale, diskuti distance, ĝui partojn de la komuna kulturo. Tiel do naskiĝis “Virtuala Kongreso” (VK) - kaj en 2020 kaj en 2021 kiel anstataŭa evento, kiu celis dum

semajno kunigi tutmondajn esperantis-tojn sub la gvido de UEA. La eventoj havis – malgraŭ diversaj obstakloj – tre pozitivan rezulton kaj sukceson. (Certe helpis ankaŭ la fakto, ke UEA-membroj povis partopreni senpage – malgraŭ tio pluraj membroj decidis donaci monon al UEA kaj helpi tiel al nia movado en tiuj ĉi malfacilaj tempoj.)

En 2020 aliĝis 2006 personoj el 97 landoj, dum en 2021 temis pri 1853 personoj el 106 landoj.

Partopreni ĉi-specan (virtualan) eventon povas ankaŭ homoj, kiuj pro diversaj kialoj (financoj, distanco, tempo-manko, familiaj devoj...) ne povus partopreni la ordinaran kongreson. Aldone ĝi ebligas ĉeeston ankaŭ al homoj de malriĉaj regionoj, kiuj eble neniam en sia vivo povos partopreni UK-on. Tamen tiel ĉi ili povas almenaŭ parte ĝui la internacian etoson, kiun Esperanto proponas kaj ebligas.

La kongreso en virtuala formo bezonas (krom partoprenantoj) du ĉefajn elementojn por sukceso: kvalitan enhavon kaj kvalitan teknikon (teknologion). Kaj ĝuste E@I-teamo helpis realigi la VK-ojn teknike. Do granda parto de la VK-oj estis organizata ĝuste de Slovakio (Tiu en 2020 el Partizánske, tiu en 2021 jam de Nová Dubnica.).

La bezono okazigi virtualajn aranĝojn aperis jam printempe 2020 – pro “Polyglot Gathering”, kiu same devis okazi nur virtuale. Tiel ekestis propra E@I-platformo por virtualaj aranĝoj: Retevent: www.retevent.com (Ne ha-

zarde ĝi portas nomon en Esperanto :).) Danke al tiu ĉi platformo do jam okazis pluraj tutmondaj eventoj, kaj estonte okazos certe pliaj.

Dum en 2020 la VK estis parto de la tutsomera Monda festivalo: <https://mondafest.net>. En 2021 la VK havis sian spacon anstataŭ UK en Belfasto, 17.-24.7.2021, kun sia ĉeftemo: **“Paco kaj konfido: universalaj valoroj”** <https://vk.esperanto.net/>.

Pri la detaloj de la kongreso eblas ekscii ankaŭ de tre belaj kaj profesie kreitaj kongresaj kurieroj:

<https://vk.esperanto.net/kuriero/>

La unuaj du “VoKoj” (Virtualaj Kongresoj) pruvis, ke la mondo kaj same nia movado jam maturiĝis por proponi apud ĉeestaj ankaŭ virtualajn eventojn. Certe la sperto kaj etoso estas plene malsama ol de la ĉeestaj aranĝoj. Tamen tiu ĉi formo ja havas ankaŭ diversajn pozitivajn flankojn – kiujn indus evoluigi por la estonto. Ni jes ja esperu, ke jam en 2022 la UK okazos ĉeeste, tamen ni esperu, ke ankaŭ virtualaj kongresoj trovos sian firman spacon ene de nia movado. Ja tutmonda internacia lingvo plene taŭgas por io tia!



UEA-estraro dum la Solena fermo de la 2a VK

Esperanto-Kvizo dumsomera

Malgraŭ la fakto, ke tiu ĉi somero estis denove limigita pri internaciaj EO-aranĝoj, aperis kelkaj alternativaj ebloj, kiel praktiki nian lingvon. Unu el ili estis la “Esperanto-Kvizo” – organizita de UEA kaj teknike prizorgita de E@I.

Entute 45 homoj havis ŝancon gajni diversajn valorajn premiojn – la unua estis kupono de UEA en la valoro de 300 EUR por libera uzo por uea-servoj! (Ne mankis ankaŭ 5x bitlibra komikso pri M. R. Štefánik de la eldonejo Espero.)

La kvizo proponis tre malsamajn demandojn, en 12 kategorioj, po minimume 50 demandoj. Eblis ludi ĉu pere

de sia komputilo, aŭ ankaŭ rekte per poŝtelefono – poentoj kalkuliĝis surbaze de rapideco de la respondoj kaj ilia ĝusteco. La kvizo ludeblis ekde la unua tago de la VK 2021, ĝis fino de aŭgusto. Ĉu la kvizo re-aperos ankaŭ en 2022? Ni esperu, temas ja pri interesa maniero instrui nian publikon diversajn faktojn pri nia movado, kulturo kaj historio! <https://kvizo.esperanto.net/>



Lucas – franca Esperanto-volontulo en E@I

Ekte septembro en Slovakio helpas Esperanto-volontulo el Francio: Lucas Riviere. Li venis por 5 monatoj (finos ĉe ni fine de januaro 2022) al E@I, danke al la kunlaboro kun EKC (Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo), Francio. EKC regule invitas eksterlandajn volontulojn neformale aŭ kadre de la franca programo Civita Servo. Pere de ĉi-civita servo do ŝajne venados francaj volontuloj pli regule al Nová Dubnica. Lucas intertempe jam multege helpis pri la plej diversaj taskoj (ekde transportado de mebloj, EO-materialoj, purigado kaj ordigado de oficejo kaj arkivo, ĝis pli fakaj – prizorgo de diversaj teknikaĵoj, verkado de tekstoj ktp.)

Post Lucas devus veni en februaro plia volontulo pere de ĉi-speca interŝanĝo kun EKC – ni do eble ekas novan, tre fruktodonan tradicion, danke al kiu nia Esperanto-komunumo iĝos pli vigla kaj internacia. Ni esperas, ke la tempo pasigita en Slovakio kaj en E@I al Lucas plaĉos kaj ke li ĝuos la lastajn semajnojn ĉi tie!



Lucas (meze) dum sia unua vespero en N.Dubnica

Porpaca konferenco – kun Esperanto

Internacia Pacforumo “Unuiĝintoj por Paco” okazis la 21-an de septembro 2021 en Bratislavo. Ĉeestis ĝin ankaŭ 5 slovakaj esperantistoj. Kio estas ege esperiga kaj ĝojiga: la civitana asocio “Unuiĝintoj por Paco”, kiu la konferencon organizis, havas rekte en sia statuto “subteni Esperanton kiel internacian lingvon de paco”!

Stano Marček estis post la konferenco rekte akceptita en la estraron kaj Peter Baláž estis akceptita kiel membro de la asocio. La forumon enkondukis tralegita alparolo de la eksa prezidento de Slovakio Ivan Gašparovič (pro sankcioj li ne povis partopreni persone). Post tio sekvis alparoloj de invititaj gastoj kaj reprezentantoj de politikaj partioj. (Vorton ricevis ankaŭ SKEF-prezidanto, Peter Baláž, por saluti nome de Esperanto-movado). La prezidanto de la forumo estas fama slovak politologo, historiisto, verkisto Eduard Chmelár – li parolis pri novaj celoj de la porpaca movado. Krome prelegis ankaŭ Ilona Švihlíková, ĉeĥa ekonomo, pri la temo “Ĉu EU kiel pacaktivulo?”. Pliaj prelegantoj: Branislav

Fábry, Ján Čarnogurský, Petr Dulák, Svetozár Nađovič.

La civitana asocio celas krei kulturon de paco kaj senperforto kiel la ĉefan antaŭkondiĉon por la paca kunekzistado de ĉiuj homoj sur la tero. “Unuiĝintoj por Paco” prezentas sin kiel alternativon al sekurecaj forumoj, en kiuj militemaj politikistoj, armilaj premgrupoj kaj armeaj strategifarantoj formulas siajn poziciojn pri internaciaj problemoj.

Simila konferenco devus okazi ankaŭ en 2022 – ĉi-foje eble eĉ kun pli da Esperanto, enkadre de la oficiala programo de la evento!



5 slovakaj E-istoj dum la porpaca konferenco

Eldonaĵoj lastatempaj

Malgraŭ diversaj problemoj de la nuna Kovim-periodo, aperis ĉe ni kelkaj gravaj, utilaj kaj belaj EO-libroj. Jen la rikolto de la lasta jaro:

PMEG 2020

La Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG) estas verko de Bertilo Wennergren por ordinara esperantistoj, kiuj volas detale studi la grama-



en facila maniero – kaj la plej bazajn aferojn, kaj tre specialajn detalojn. Ĝi uzas por helpi al la klarigoj abundon da ekzemploj, inter kiuj estas multege da ekzemploj el la Fundamento kaj la verkaro de Zamenhof. La nova eldono de PMEG – sub la nomo PMEG 2020 – estas profunde tralaborita eldono, kun multaj novaj partoj kaj kompletigoj. Mendi ĝin kontraŭ 38 EUR eblas ĉe <https://pmeg.ikso.net/> aŭ rekte kun aliaj EO-varoj [en www.espero.sk](http://en.www.espero.sk)

Manlibro pri instruado de Esperanto



Por bone kaj efike instrui nian lingvon, nia movado bezonas trejnatajn instruistojn, tiajn, kiuj havas pedagogiajn kaj metodologiajn konojn kaj spertojn, informojn pri modernaj metodoj, kiuj konas la plej modernajn lernilojn kaj helpilojn kaj kapablas organizi sian laboron, ĉu ene de la movado, ĉu responde al la postuloj de instituciaj kadroj.

Pro la fakto, ke ne facilas organizi ĉie ĉeestajn trejnadojn, multaj el niaj instruantoj bezonas almenaŭ faklibron kaj subtenon. La nova *Manlibro* ple-

tikon, vortfaradon, skribon kaj elparolon de la Internacia Lingvo. PMEG estas unuavice praktika lernilo, ne teoria verko por lingvistoj. Ĝi provas klarigi la lingvon

numas kaj tiujn taskojn kaj disponigas materialojn ankaŭ por trejnadaj.

- La libro entenas 176 artikolojn de 12 aŭtoroj. La tri ĉefaj kontribuintoj estas: Katalin Kováts, Stefan MacGill kaj Birke Dockhorn. La redaktadon kaj unuecigon realigis Katalin Kováts, profesia lingvopedagogo.

- La nova eldono havas duoble pli da paĝoj ol ajna libro de la antaŭaj eldonoj. Ankaŭ la strukturo ŝanĝiĝis kaj la libro signife plibeligiĝis.

- Pluraj novaj artikoloj traktas modernajn ilojn, aplikajojn, formojn de nuntempaj manieroj lerni kaj instrui Esperanton.

- La libro donas ideojn por sukcesa informado pri Esperanto, organizado de lingvaj eventoj, funkciigo de standoj kaj efika argumentado pri Esperanto. Mendi ĝin kontraŭ 18 EUR eblas ĉe <https://manlibro.ikso.net/>

Ruĝaj vojoj




Kio estas Aŭrovido? Ĉu eksperimenta ekovilaĝo en la ekzota ĉirkaŭaĵo? Alternativo al la estonta realeco? Ĉu utopia projekto, daŭrigita dank' al la ŝtata helpo kaj privataj donacoj? Ĉu eble la unika liberspaco kaj samtempe la fonto de inspirado al tiuj, kiuj serĉas alternativon rilate al la nuna tutmondismo kaj dominado de la granda kapitalo?

En la jaro 2010, Paweł Kowalczyk restadis ses monatojn en Aŭrovido kiel

volontulo kaj revenis tien okaze de postaj vizitoj en Barato. Tra la priskribo de siaj travivaĵoj kaj aventuroj li ebligas al ni malkovri tiun unikan lokon, koni ĝiajn loĝantojn kaj volontulojn. Li aperigas la funkciadon de tiu komunumo, ĝian pasintecon kaj ĝian fundan filozofion. Li montras al ni multajn novaĵojn kaj elsubajn iniciatojn de grandkoraj homoj, kiuj dediĉis sian talenton kaj siajn ŝparaĵojn al "la Ideo".

La aŭtoro priskribas ankaŭ defiojn de la ĉiutaga vivo, ekonomian kaj socian situacion de la loĝantoj de la barata ŝtato Tamil Nadu - la plej proksimaj najbaroj de Aŭrovido. Li elmontras la lukton kun la biopirato kaj la granda kapitalo, kaj klarigas, interalie, kial la barataj kamparanoj enfalas en la ŝuldospiralon kaj kial la loka bovino ne plu estas sankta. A5-formato, 290 paĝoj; Aŭtoro: Pawel Kowalczyk; Traduko: Ewa Grochowska, prezo 15,- EUR. Detaloj: <https://www.espero.sk/p/rugaj-vojoida-aurovido2/>

Konfuziloj – reeldono



Reeldono de la populara instruilo. Riĉe ilustrita plenkolora libro, kiu prezentas al ni la plej "komplikaĵojn" vortojn, kiuj faras nian lingvon malfacila - instruilo pri falsaj amikoj kaj diversaj esperantonimoj. Utilega lerno-materialo por ĉiu, kiu volas mastri nian lingvon perfekte! Prezo: 12,- EUR; Detaloj: <https://www.espero.sk/p/konfuziloj2/>

La domo ĉe Pu-Angulo



La plej lasta eldonaĵo ĉi-jara estas daŭrigo de la fabelaj rakontoj de la tutmonde populara urseto Pu. En la nova titolo "La domo ĉe Pu-Angulo" do atendas nin la malnova heroo kun novaj aventuroj. Belega fabellibro, kun tre kvalita preslaboro – plenkolora, malmola kovrilo. Eldonita de EAB (Esperanto-Asocio de Britio), sed presita en Slovakio, ĝi certe ĝojigos diversaĝajn legantojn tutmonde. Mendeblo (16,- EUR), detaloj: www.espero.sk

Esperanto-buŝmaskoj



Buŝmasko iĝis certe la simbolo de la jaro 2020 – ĉu ni ŝatas tion aŭ ne. Antaŭ jaro por multaj neimagebla, nun deviga tutmonde. Estas klare, ke indas protekti kaj sin mem kaj la aliulojn – do jen, kial ne fari tion kaj samtempe dume varbi por Esperanto? Tial E@I proponas unikajn Esperanto-buŝmaskojn! Haveblas 5 malsamaj, sed tre allogaj aspektoj, ĉiu kun la ĉefa mesaĝo: "Esperanto". Granda avantaĝo ankaŭ estas, ke eblas mendi plurajn (eĉ multajn) maskojn, kaj ne pagi altajn sendokostojn – maskoj estas malpezaj, do eniras multaj al malpeza pakaĵo. Do jen, eble al kutima kristnaska poŝtkarto ĉi-jare alpaku al Esperanto-amikoj aldone Esperanto-buŝmaskon! Mendi ĝin kontraŭ 6 EUR eblas ĉe masko.ikso.net/

Preparis: Peter Baláž

El la planoj de SKEF por 2022 (koncize)

Jen mallonge pri kelkaj niaj pli konkretaj planoj por la sekva jaro. Ĉu vi mem havas iujn EO-planojn, aktivaĵojn sciindajn? Ne pre skribu al la dissendolisto esperantosk@googlegroups.com, kaj/aŭ al nia nuna SKEF-adreso: skef.esperanto@gmail.com.

La 40-a Poludnica okazos – 7.-9.1.2022

Jes ja, malgraŭ nunaj obstakloj estas plano okazigi memoran eventon "Poludnica 2022", omaĝe al ties fondinto Ján Vajs. Nun venas tempo por la jubilea, 40-a Poludnica. Okazigu kaj ĉeestu tiun ĉi 40-an Poludnica-n! Decembre ni aperigos pli da informoj pri la evento en poludnica.esperanto.sk kaj dissendos retpoŝte.

TEK 2022 – majo/junio? Tutslovakia Esperanto-Kongreso devus okazi printempe. Ĝi laŭeble okazu aŭ majo aŭ junio. TEK 2022 do plej verŝajne okazos en junio en Nová Dubnica. Pli da informoj precipe en la retejo esperanto.sk.

PS: Ĉu vi ŝatus agi en la nova SKEF-estraro ekde 2022? Ĉu vi havas bonajn ideojn por progresigi Esperanton? Anoncu vin ĉe skef.esperanto@gmail.com.

KAEST 2022. Se la mondo "normaliĝos", oktobre povos okazi ankaŭ la konferenco "KAEST" ĉeeste. (Ni esperu!)

UK en Montrealo. Pripensu do, post 2-jara paŭzo, vojaĝi al Kanado en 2022! La UK okazos inter la 6a kaj 13a de aŭgusto en Montrealo.

Tiu ĉi UK jam estos kunorganizata ankaŭ de Nová Dubnica – de E@I-teamo. Aliĝu kaj legu pli da informoj: esperanto2022.ca kaj uea.org/kongresoj

IJK en Nederlando. La 78-a Internacia Junulara Kongreso - IJK 2022 okazos en De Roerdomp –

Westelbeers, Nederlando, inter la 20-a kaj la 27-a de aŭgusto 2022. Detaloj: ijk2022.tejo.org
SES 2022 – ĉu finfine Ĉeĥio? Jes ja, ni esperu! Post 2 jaroj de devigaj paŭzoj estus jam tempo por plia ĉeesta Somera Esperanto-Studado. Ĉi-foje do – se eblas – ni renkontiĝu julie en Kroměříž. Pli da detaloj venos printempe ĉe ses.ikso.net

Reta (skanita) kolekto de "Esperantisto Slovaka". La revuo "Esperantisto Slovaka" ekis sian vivon en 1946. En nuna tempo (de ciferecaj amaskomunikiloj, retejoj, sociaj retoj...) eĉ pli indas kaj gravas konservi niajn historiajn dokumentojn kaj valorojn. Dum 2022 ni do espereble sukcesos skani kaj rete publikigi la kompletan 70-jaran historion de la papera revuo. Ĉu vi emus helpi pri ĉi-projekto? Vi estas pli ol bonvena! Niaj antaŭuloj kaj la gazeto mem meritas ĉi-specan konservigon kaj arkivigon.

Esperanto-arkivo kaj biblioteko. La plej grava agado nun okazas (kaj ankaŭ en 2022 okazos) en Nová Dubnica – en kiu naskiĝas nova Esperanto-centro. La E@I-oficejo jam funkcias, dum sekvaj monatoj venos tempo por finpretigi ankaŭ la novan Esperanto-arkivon kaj bibliotekon – ĝi estos komuna spaco kun UEA. Por finpretigi la lokon, brigadoj estos certe bezonataj kaj bonvenaj. Se vi do volus helpi kontakto nin (skef.esperanto@gmail.com). Ĉiu aldona mano estas bonvena! (Ni ankaŭ ĝojos pri ajna financa subteno - kontribuo, kiu povos helpi vivteni la lokon, pagi la energiojn kaj aliajn kostojn de la nova ejo.)

Prezidanto de SKEF:
Peter Baláž



Poludnica - la kormonto de Jano Vajs

